



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Oktoebro 2019 n-ro: 46



*Merhaba,*

*Saluton,*

Ĝste Ekim sayımız ! Baŝladığımızdan beri 46 ay geĉmiş.

Jen nia oktobra numero! la 46-a ekde nia komenco.

Bu sayımızda sizlere okumanız için gene her zamanki gibi birbirinden ĉok farklı ve güzel yazılar sunuyoruz.

En ĉi tiu numero ni denove prezentas diverstemajn kaj tre belajn tekston por via legado.

Aralarında tavsiye edeĉimiz mutlaka okunması gerekenlerden bazıları:

Inter ili ni proponas al vi la jenajn tekstojn:


- Tempo Sigelita köŝesinde "La pentraĵo" adlı filmin yorumu. Yazan KONuralp Sunal.
- Ünlü esperantist Vasilij Eroŝenko hakkında bir hikaye: "Nokta Veturo".
- Andy Weir'in bir hikayesinin ĉevirisi "La Ovo". ĉeviren Coŝkun Atak.
- Schiller'den bir ŝiir ĉevirisi "La ringo de Polikrato".
- Daha detaylı bilgi için "Polikrato" hakkındaki hikayeyi de okuyabilirsiniz. Yazan Spiros Sarafian.
- Carmel Mallia'nın güzel bir ŝiir "Festo".

- Recenzo pri la filmo "La pentraĵo". Verkis Konuralp Sunal.
- Rakonto pri la fama esperantisto Vasilij Eroŝenko: "Nokta Veturo"
- Tradukaĵo de rakonto de Andy Weir: "La Ovo". Tradukis Coŝkun Atak.
- Tradukaĵo de poemo "La ringo de Polikrato" el Schiller.
- Se vi volas scii pli pri "Polikrato" legu la artikolon verkitan de Spiros Sarafian.
- Bela poemo de Carmel Mallia "Festo".

*Hepinize iyi okumalar !*

*Bonan legadon al ĉiuj !*

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



[www.CDELI.org](http://www.CDELI.org)

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Internacia Tago de Paco	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Mallonga raporto pri la Itala Kongreso de Esperanto	4
Rezolucio de la 86-a Itala Kongreso de Esperanto, Triesto 2019	5
La unua IJK en Slovakio	5
Feliĉo	6
Tempo Sigelita	7
ΠΟΛΙΚΡΑΤΟ (ΠΟΛΥΚΡΑΤΗΣ)	8
La ringo de Polikrato	11
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 17)	12
Pestaj Tempoj	13
Festo	13
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	14
Franco KAFKO (franz Kafka)	15
Neelĉerpebla energifonto	17
El la libro de "Dao de Jing" (37)	17
Hej, la grupoj	18
Nokta Veturo	19
Ŝercoj	20
Kurcvortenigmo	20
Tra la loko ensorĉita (Rakonto de rusa pastro)	21
La morto de la rusa virino	23
La nuna homaro atingis la finon de evoluo komenciĝas malevoluo	24
La Ovo	25
Arto en la Traduko	26
Vasil Kadifeli – Tradukisto-Esperantisto	28
La brazila astronauto kaj Dio	29
Kiel oni difinas sciencfikcion?	29
Porko sub kverko	30
Ni lernu Esperanton!	31
Facilaj rakontoj	32
Solvo de la krucvortenigmo	32

## Kursoj



Finiĝis la kurso de Esperanto en la lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbul. En somero ne okazos aliaj kursoj.

Murat Ŭzdizdar pensiĝis el Ŭskŭdar Amerikan Lisesi lernejo, do ekde venonta jaro la ŝanco daŭrigi EO klubon en ĉi tiu lernejo, bedaŭrinde, estos malalta.

## Internacia Tago de PACO

**21-a de septembro : Internacia Tago de PACO**



Karaj kolegoj, instruistoj, instruantoj, karaj geamikoj,

Kiel iu homo povas agi por paco, kiam la ŝtatestroj, kelkaj el ili, estas tiom malraciaj, malrespektaj... Jes, ni ne kalkulu je la porpaca agado de la politikistoj. Ni devas agi el la nivelo de la civitanoj. Ni devas agi tie, kie ni estas. La civila socio kaj ĉefe la junularo estas alportantaj la necesajn ŝanĝojn. En nia rolo de instruistoj, ni havas ŝlosilan pozicion.

Ni povas alparoli geknabojn montrante la gravecon de respekto de knabo al knabino, de viro al virino. Ni povas montri Gandhi pli ol Hitler en niaj kursoj pri historio. Ni povas emfazi pozitivajn faktojn kaj pozitivajn personecojn, kiel ni ĉe ILEI provas fari redaktante nian revuon Juna Amiko. Ni povas prezenti pozitivajn agadojn kaj artaĵojn el la tuta mondo kaj ne nur el nia eta konata cirklo enlanda aŭ enkontinenta. Ni estas bonŝancaj, ĉar per Esperanto ni havas aliron al scioj pri la tuta mondo. Ne multaj homoj havas tian avantaĝon. Per agado respektante al la naturo, al la medio, al ĉiuj bestoj kaj homoj, ni montru bonan ekzemplon al niaj gestudentoj; ni ne povas eviti esti ekzemploj. Diversaj institucioj kiel Unuiĝinta Nacioj kaj UNESKO laboras por paco; ni povas prezenti

>> 6

## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo




Karaj amikoj,

la 59-a Sumoo sukcese finig<sup>is</sup>. Koran dankon pro via partopreno.

1. La nombro de partoprenantoj estas 300 el 32 landoj.
2. La kvanto de legitaj paĝoj estas 20 000 paĝoj.
3. Bedaŭrinde neniu partoprenis el Oceanio. Ĉu vi ne povas inviti viajn amikojn en Oceanio?
4. El Afriko du partoprenis. Ili havas problemon enmanigi librojn. Al unu, kelkaj sendis librojn, sed nur unu pakaĵo atingis ŝin. Krome mi trovis, ke kiam ŝi ricevas pakaĵon, ŝi devas pagi imposton. Tio estas problemo por ŝi. Mi rekomendis, ke ŝi legu la revuon Turka Stelo.

La 60-a Sumoo komenciĝos la 10-an de novembro. Mi atendas vian partoprenon kune kun viaj geamikoj.

HORI Jasuo (s-ro)



## UEA



N-ro 827 (2019-09-24)

**Biblioteka Apogo Bachrich atendas subvencipetojn**

Jam la sesan

sinsekvajn jaron UEA disdonas subvenciojn el la Biblioteka Apogo Honore al la geedzoj Johano kaj Maria Bachrich, mallonge nomata Biblioteka Apogo Bachrich, kiu celas pliriĉigon de Esperantaj bibliotekoj, kiuj ne ricevas ŝtatajn, urbajn [...]

N-ro 826 (2019-09-21)

**La konsisto de la nova Afrika Komisiono de UEA (2019-2022)**

La Estraro de UEA ĵus unuanime aprobis la konsiston de la nova Afrika Komisiono de UEA, por la periodo 2019-2022. La propono venis de la estrarano de UEA por Afriko, Jeremie Sabiyumva, post akcepto de kandidatiĝoj kaj konsultiĝo kun plurjaraj aktivuloj ekster kaj en la kontinento. [...]

N-ro 825 (2019-09-20)

**Mesaĝo al la esperantistaro okaze de la Internacia Tago de Paco, 21 septembro 2019**

Ĉiujare, tra la tuta mondo, oni festas la Internacian Tagon de Paco. La Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj deklaris la 21-an de septembro tago dediĉita al plifortigo de la idealoj de paco ene de, kaj inter, ĉiuj nacioj kaj popoloj. [...]

N-ro 824 (2019-09-12)

**Malferma Tago la 30-a novembro**

La stabo de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO invitas vin al la 51-a Malferma Tago, kiu okazos sabate, la 30-an de novembro 2019, de la 10-a ĝis la 17-a horo en la CO de UEA kaj TEJO en Roterdamo ĉe Nieuwe Binnenweg 176. [...]

## TEJO



**Estu parto de la Elekta Komisiono de TEJO**

La Elekta Komisiono estas Organo de TEJO, kies ekzisto kaj funkcio estas priskribita de la Reglamento pri Elektro de Estraranoj. Ĝia tasko estas kolekti kandidatiĝojn por la estraro [...]

**TEJO partoprenis kunsidon de Forumo Junulara Eŭropa en Bruselo**

TEJO partoprenis kunsidon de membroj de FoJE – Forumo Junulara Eŭropa (European Youth Forum) la 8-an de septembro en Bruselo por pridiskuti la strategian laborplanon. [...]

**Ekkonu la novan Estraron de TEJO 2019-2020**

Dum IJK 2019 en Slovakio estis elektita la nova Estraro de TEJO por la mandato 2019-2020. Ni ĝojas prezenti al vi la novan teamon! [...]

**TEJO serĉas partnerojn por Erasmus+ projekto**

Alproksimiĝas la limdato por kandidatiĝi por Erasmus+ projektoj (1-an de Oktobro). TEJO serĉas organizojn, kiuj ŝatus iĝi partneroj kaj pretus helpi ankaŭ kun la kandidatiĝo mem. [...]

**Nova numero de Revuo Kontakto – Lingvoj ne mortas, oni mortigas ilin**

Enkonduko de la redaktoro Rogener Pavinski  
La jaro 2019 estas deklarita internacia jaro de indiĝenaj lingvoj laŭ Unesko. La celo estas, per tio kontribui al la konscio pri la urĝa bezono zorgi, revigligi kaj antaŭenigi indiĝenajn lingvojn en la mondo. [...]





## Leteroj de niaj legantoj



Revuo varitema, internacieca, bonkvalita lingvo.  
Ĉu mi povas karakterizi tiel ankaŭ la lastan numeron de Turka Stelo? Mi pensas, ke jes.



Koran dankon, karaj.  
Amike,  
**Maria Nazaré Laroca** el Brazilio

Gratulojn karaj!

**Bardhyl Selimi** el Albanio

## Mallonga raporto pri la Itala Kongreso de Esperanto



### 86-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

Triesto, 24-31-a de aŭgusto 2019

estraro de Eŭropa Esperanto-Unio kaj alia pri la personeco de Leonardo da Vinci, en la kadro de la festado de la 500-a datreveno de lia morto (1519). Pluraj kontribuoj ririgardis la produktadon de ĉi tiu renesanca geniulo laŭ ŝanĝiĝanta perspektivo ĝuste por evidentigi la tutan riĉon kaj la malsimplecon de liaj pensoj, agadoj kaj atingitaj rezultoj en tiom da kampoj de la homa scio.

### INFORMITALE

Oficiala inform-servo de Itala Esperanto-Federacio  
\*\*\*\*\*

### Mallonga raporto pri la Itala Kongreso de Esperanto

Kiel en ĉiuj aliaj okazoj, ankaŭ nun restas ioma maldolĉo kaj sopiro po la impresoj kaj emocioj ĵus travivitaj. Antaŭ nelonge finiĝis en Triesto la itala Esperanto-kongreso de 2019. La 258 partoprenintoj venis el ĉiuj kontinentoj krom Aŭstralio kaj Ocenao. Ili renkontiĝis en la ĉefurbo de la itala landoparto Friuli Venezia-Giulia, por ankoraŭfoje ĝui la italan gastemecon, la belaĵojn historiajn-artajn kaj naturajn de nia lando kaj la varman akcepton de italaj esperantistoj.

Malproksimaj de la daŭra kaj intensa trafiko de la marbordo trieta, ni eniris pacan oazon en la vastaj kaj festaj salonoj de la hotelo "Savoia Excelsior Palace", kiu gastigis dum unu semajno nian iniciaton.

Dimanĉe la 25-an de aŭgusto la kongreso esti oficiale inaŭgurita per filmita mesaĝo sendita de la membro de la nun finiĝanta Eŭropa Komisiono, la litova Vytenis Povilas Andriukaitis. Lia parolado en Esperanto temis ĉefe pri la lingvaj defioj, kiujn Eŭropo renkontos en la estonta tempo.

La sekvaj tagoj proponis tre riĉan programon. Krom la kutimaj Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, okazis seminario dediĉita al la problemoj de disvastigo de Esperanto en Eŭropo gvidita de la

Okazis ankaŭ multnombraj prelegoj pri temoj centraj en la Esperanto-komunumo kiel la rilato inter la gepatra lingvo kaj duaj lingvoj kaj la delikata demando pri lingvo-demokratio.

En la programo, krome, estis libro-prezentado kaj disko-prezentado pri ĵus aperintaj verkoj, ekspozicio de aĉetebraj libroj por lego-ŝatantoj kaj ekskursoj duontagaj aŭ tuttagaj al la plej fascinaj lokoj de tiu lando-parto. Male dum la vesperoj oni ĉeestis koncertojn kaj teatraĵojn foje en tre sugestoplenaj lokoj kiel la kastelo de Triesto sur la pinto de monto apud la katedralo.

Do, ankaŭ ĉi-jare italaj kaj neitalaj esperantistoj havis la eblecon partopreni spertojn tre pozitivajn kaj pensojn pri la problemoj kaj la perspektivoj, kiuj ĉirkaŭas ilian komunumon, disiĝintan en la tuta mondo sed unuiĝinta pro komuna lingvo kaj pro la valoroj de amikeco, solidareco kaj respekto por aliaj, je kiuj konformiĝis ilia tuta historio jam pli ol centjara.

\*\*\*\*\*

### Informitale

Itala Esperanto-Federacio - <[fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it)>  
Itala Esperantista Junularo - <[iej@esperanto.it](mailto:iej@esperanto.it)>  
via Villorresi, 38 I-20143 Milano - Tel+fax +39 02 58100857

<http://www.esperanto.it/>

Kontribuojn sendu al: [massimo.ripani@esperanto.it](mailto:massimo.ripani@esperanto.it)

Kompilanto: **Massimo Ripani**

## Rezolucio de la 86-a Itala Kongreso de Esperanto, Triesto 2019

La 86-a Itala Kongreso de Esperanto, okazinta en Triesto de la 24-a ĝis la 31-a de aŭgusto 2019-a kun 258 partprenantoj el 28 landoj el ĉiuj kontinentoj, gastiginte la konferencon de Eŭropa Esperanto-Unio,

- Aŭskultinte la inaŭguran paroladon de la eŭropa komisionano Vytenis Andriukatis, kaj la mesaĝon de la prezidanto de UEA, Duncan Charters

- Debatinte pri la nunaj mondaj problemoj kaj pri la lingvaj aspektoj de ili inkluzive de la strategio bezonata por prezenti Esperanton kiel progresigan faktoron en la nuntempo,

**konstatas kun konsterno** la kreskon en multaj partoj de la mondo de penso-fluoj kaj sekvaj politikaj agoj rekte kontraŭaj al la bazaj valoroj de la Esperanto-movado: paco, egaleco, neperforto, respekto por ĉiu homo, solidareco, respekto de la vivopovo de nia planedo kaj de la estontaj generacioj, respekto de la mondaj organizaĵoj kaj de ilia laboro por paca, multpolusa mondo

**salutas kaj gratulas** la esperantistajn laborantojn por disvastigo de Esperanto kaj de niaj valoroj kaj instigas ilin daŭrigi malgraŭ la mokaj admonoj

**petas** la internaciajn Esperanto-organizaĵojn, aparte la Universalan Esperanto-Asociacion kaj Eŭropan Esperanto-Union,

- Klopodi realigi la celojn indikitajn de Zamenhof kaj enskribitajn en la Deklaracio pri Esperanto en Bulonjo-ĉe-maro: "La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrala".

· zorgi pri la ĉefa tasko de la estraroj de la internaciaj Esperanto-organizaĵoj, tio estas prezenti Esperanton kaj la idealojn kunligitajn kun ĝi en nuntempa formo akceptebla almenaŭ al tiu parto de la moderna homaro, kiu estas malfermita al ideoj pri solidareco, kunlaboro, plijustigo de la mondo,

· Kompreni, ke sen tiu akcepto, ĉio cetera estas vana.

· Samtempe gvidi la laborantojn pri Esperanto je landa kaj loka niveloj pri la maniero kiel plej efike penadi por disvastigi Esperanton en sia teritorio.

## La unua IJK en Slovakio

**Ĉ**i-jare mi partoprenis mian unuan Internacian Junularan Kongreson (IJK). Ĝi okazis de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto en Liptovský Hrádok (Slovakio) kun 291 aliĝintoj el 46 landoj (reale venis 231 el 35 landoj). Liptovský Hrádok estas ĉarma urbeto kiu troviĝas en montara brakumo, same kiel ĝia iom pli granda najbaro Liptovský Mikuláš, al kiu la kongresa programo vojaĝigis nin.

La tuta densprograma semajno komenciĝis dimanĉe, kiam venis plejparto de la partoprenantoj. La tago estis plena je hastmomentoj, kiam venis grupoj, kaj meritita ripozo, dum kiu ni atendis sekvan grupon. Ĉiu kongresano ricevis praktikan kongresan dorsosakon en kiu estis, ekzemple, metala trinkbotelo kiu utilis ĉefe dum la ekskursita tago, sed ankaŭ kajero, kiun mi persone eluzis dum Esperanto-kurso. Por plifaciligi komunikadon inter esperantistoj el pli ol tridek landoj kaj lokaj kelneroj, en la manĝejo la organizantoj elpensis sistemon de koloraj braceletoj kun folklora motivo. Ĉar mia tasko estis disdoni kaj fiksi la braceletojn ĉe manoj de partoprenantoj, mi povas diri ke multaj ilin vere ŝatis. Mi taksas ĉi tiun

## -- el la Balta Ondo



ideon ege valora flanke de SKEJ – Slovaka Esperanto-Junularo.

Ĉiutage okazis bunta programo. La temo de la kongreso estis "Batalo kontraŭ antaŭjuĝoj", kaj kadre de la temo oni povis spekti temajn filmojn kun Esperantaj subtekstoj, partopreni multajn prelegojn kaj diskutojn. Krom tio okazis ankaŭ Esperanto-kursoj, diversstaj prelegoj (pri klasika muziko, slovakaj folkloro, vivo de arboj ktp), danckursoj kaj kreivaj manlaboroj. Kiam mi ĉeestis prelegojn, ĉiam partopreni estis ĉiam granda kaj la programĉambroj plenaj. Mi ĝojis pri bunta interesiĝintaro pri manlaboroj, kiujn mi gvidis, kaj kiuj malgraŭ mia antaŭtimo iris sukcese.

La menciitaj programeroj estis akompanataj per

duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj. Bone elpensitaj, bone realigitaj. Esperantistoj povis viziti kastelojn, grotojn, preĝejojn, naturon. Mi aliĝis al ekskurso "Goralaj juveloj", dum kiu mi vidis esperantistojn en lokaj tradiciaj geedziĝfestaj popolkostumoj, ni vizitis la ĉaskasteleton Hohenlohe, pri kiu mi eĉ ne sciis antaŭe, kaj ni promenis sur arbokrona vojeto en Baĥleda valo, kiun mi delonge volis viziti. Kvankam la vetero ŝanĝiĝis ofte dum la semajno kaj pluvis ofte, ĵaŭde fine de la tago, kiam ni estis en Baĥleda valo, la suno kompatis nin kaj ĝoje lumis. Bona vetero daŭris ĝis la vespera pikniko apud kongresurba kastelo, kie ni povis ĝui esperantistaron, bongustan fruktan salaton kaj koncerton de Noa kaj Martí.

Ankaŭ aliaj koncertoj estis akompanitaj per feliĉa aplaŭdo de la kongresanoj. Se temis pri ĉeĥaj kaj slovakaj kantistinoj Barbora Hazuchová kaj Adela Kvířtová, slovaka akordeonisto kaj loka dancgrupo Jessy aŭ pri Esperantaj artistoj kiel Johny M, Tim Gallego, Kimo kaj Garo, Emerson, la etoso estis ĉiam

bonega kaj la spektantaro dancema. Mi persone ne diskejmis multe dum la semajno, sed laŭdire estis diskejo, drinkejo kaj gufujo popularaj ekde la vespero ĝis la nokto-nokto-fin'.

Mi ne povas kompari ĉi tiun IJKon kun aliaj, ĉar mi neniu alian partoprenis, sed mi pasigis ege agrablan semajnon. Dominis malstreĉa kaj amikeca etoso, pli ripoziga ol tiu, kiun mi memoras de la 101a UK en Nitra (2016). Dum la oficiala fermo organizantoj transdonis la flagon de IJK al la organiza teamo de la 76a IJK en Nederlando.

Mi deziras al ili sukcesan organizadon, kaj ke partoprenantoj de la onta IJK denove spertu semajnon plenan je bonaj travivaĵoj.

**Emília Štecová**

Fonto: **La Balta Ondo** <http://sezonoj.ru/2019/08/slovakio-28>

## Feliĉo

-- verkis Dr. Paulo Sérgio Viana el Brazilio

la plej feliĉa inter miaj hundoj  
estas tiu kiu malpli apartenas al mi  
ĝi vagas tra la stratoj  
gaje kondukas al la najbaroj  
estas konata en la panvendejo  
ĝin salutas la busŝoforoj  
ĝi bojas al la aŭtoj  
timigas la biciklantojn  
provokas aliajn hundojn malantaŭ  
kradoj  
ĝi alvenas kiam ĝi mem tion  
decidas  
manĝas  
trinkas  
dormas  
foriras  
ĝi estas la plej feliĉa inter miaj  
hundoj  
ĉar ĝi estas la plej libera



verkis Dr. Paulo Sérgio Viana el Brazilio

Fonto: [https://blogdopaulosergioviana.blogspot.com/2019/08/felicidade\\_15.html](https://blogdopaulosergioviana.blogspot.com/2019/08/felicidade_15.html)



**2 >>** iliajn agadojn en niaj kursoj. Ekzakte nun en septembro 2019 oni festis en Ĝenevo la fondon de la Ligo de Nacioj en septembro 1919, estis la unua paŝo al multlaterala kunagado. Unuiĝintaj Nacioj heredis tiun rolon kaj klopodas laborigi la registarojn unuvoĉe.

Nenio estas perfekta, neniu estas perfekta. UN ne estas perfekta organizo, niaj ŝtatestroj ne estas perfektaj. Sed se ni rezignas pri porpacaj agadoj pro la fakto, ke niaj registaroj nenion faras, la mondo neniam ŝanĝiĝos kaj pliboniĝos. Ni devas ekpaŝi konscie kaj celtrafe, loke kaj tutmonde. Nia instruado

devas esti modelo de justeco kaj efikeco, devas transdoni al niaj lernantoj solidarecon, toleremon, resume respekton. Temas pri respekto al ĉiuj homoj kaj al la naturo, por ke nia planedo kaj la tuta homaro povu plu vivi. Nia lingvo Esperanto donas al ni senton de aparteno al tutmonda homa familio. Tio donu al ni kuraĝon kaj agemon.

**Mireille Grosjean**

Prez de ILEI  
2019-09-20




## LA PENTRAĴO (Le tableau)

LOLA: Sed, se li amas vin, kial vi divenas fabelojn unu por la alia?

CLAIRE: Ĉar tiuj fabeloj aldonas belecon al niaj vivoj.

**L**a filmo "La Pentraĵo" alportis min en tempon, kiam mi sonĝis pri granda mondo en ununura ilustraĵo de fabel-libroj, kiam mi pensis, ke ĉiuj



ludiloj kaj objektoj havis siajn propran animon, do al mia infanaĝo. Sed ĉi tiu ne estas simpla kaj "infaneca" filmo – tio, kion ni kutime diras por malestimi ion!.

Kion ĉi tiu filmo sentigis min estas la rilato inter Dio kaj homo. La rilato inter kreito kaj kreinto. Iuj ne kredas je

"kreado". Parolu pri

la universo, se vi ne ŝatas la koncepton de "Dio". Mi pensas, ke la rezulto ne ŝanĝiĝos. Ni troviĝas ene de pentrita komponaĵo. Sed ĉu Li vere pentris ĝin perfekte? Kio pri la skizoj, kiujn Li ne ŝatis? Kio pri la nefinitaj figuroj? Kio pri la nekompletigitaj? Ĉio ĉi troviĝas en ĉi tiu filmo. Ĝuste same al la malegalecoj en la vivo. Se Dio (la pentristo) kreis ĉion simplan, ĉu la homoj (figuroj, kiujn Li pentris?) kreis ĉi tiun neegalan ordon?

Parolante kun Lola ĉe la fino de la filmo, la repliko de la pentristo estas: "Mi donis al ili la bazajn aferojn por subteni iliajn vivojn. Simpla desegnaĵo ofte estas pli impresa ol zorge finita bildo. Do ili mem kompletigis ĝin. Estu tiel, kiel ili feliĉas!"

Dum mi spektis ĉi tiun filmon, mi rememoris pri du aliaj filmoj: "La Purpura Rozo de Kairo" (The Purple Rose of Cairo) kaj "La Rakonto de Ludilo" (Toy Story). Jes ĝiaj temoj estas tute aliaj sed la nura simileco estas la gajno de animo de la senvivaĵoj. En la unua filmo la aktoro eliras el la ekrano, al la reala vivo. En la dua, la ludiloj viviĝas.

Nun, al ni la plenkreskuloj, kiuj kutime elparolas grandajn troigajn vortojn, tio, kio ŝajnas logika estas, ke danke al tiuj filmoj, ni povas reiri al la tempo de "animismo" de nia infaneco. Tio, kion ni nomas logiko, nin vere alligis al la gravito. Ni forlasis la flugadon

super kaj preter la nuboj al infanoj kaj al la kreinto de ĉi tiu filmo, tio estas al artisto de animacio, pup teatro kaj ombroteatro Jean-François Laguionie. Ĉi tiu potenco tamen ekzistas ene de ĉiuj de ni.



Mi rememoras kelkajn el la bildoj de la fabelo libro "La Persista Stana Soldato", kiu estis presita sur bela brilpapero... Ene de la paper-boato drivante sur la kloakaĵo, la unukrura Stana Soldato kaj la muso en la rando de la kanalo... La Baletistino kaj la Stana Soldato...


Kaj pri la Lampo de Aladino! Aladino, kiu frotas la brilantan lampon... La ĝino, kiu eliras el la lampo... Pinokjo... La filo de ĉarpentisto-majstro Geppetto... Geppetto unue skulptis lian kapon el ligno en siaj manoj... Pinokjo en la ventro de baleno kaj sia patro Geppetto, kiun li retrovas pli poste...

Kiam mi estis maljuna, mi kutimis paroli kun miaj ludiloj kaj mi eĉ kredis, ke objektoj havis animon. Marioneto arto estas pruvo pri tio, ĉu ne? Mi rememoras iun fabelon el la libro "Turkaj Fabeloj" kompilita de la Germana rakontistino Elsa Sophia von Kamphoevener. Tiu ĉi fabelo parolas pri tri viroj, kiuj rifuĝas en kabano en arbaro kaj skulptas virinan statuon el ligno kaj ĉio, kio okazas post tio.

Pigmaliono, d-ro Frankeŝtajno estas versioj de ĉi tiu duopo "kreinto-kreito". En iu marionet-festivalo en Istanbulo mi spektis spektaklon farita de iu grandega, nigre vestita, itala barbulo, kies nomon mi ne memoras nun... Li tenis marioneton, flekseblan, palan kiel ostoj, maldikan kiel skeleto kaj senmienan. Sur lia tablo estis nur pordo kaj ĝia kadraĵo kaj la tuta scenejo plej bone prezentis la homon kontraŭ la eterneco kaj morto kaj siaj vanaj klopodoj same al tiu de Sisipo, kiu daŭre portas la rokon al la supraĵo de la monto sed poste ĝi ruliĝas suben...

La filmo de Jean François Laguionie pensigis min pri la scenoj de la poeziaj pentraĵoj. Sed ne nur pri ĉi tiuj. En la fino de la filmo, la sceno kie Lola, ekster la pentraĵoj en kamparo, finfine renkontiĝas blankharan kaj barban pentriston, kiu pentras rememorigis min pri iu el miaj infanaĝaj spertoj: Mi kun miaj strat-geamikoj Nermin kaj Levent ludante surstrate subite forkuris en apartamenton. Por kio? Ĉar iu, eble la pli aĝa fratino de Nermin, Fadime, ekkriis: "Forkuru! Venas patro Dio (Allah Baba)!"... Kaj post tio, ni el la malfermeta pordo rigardetis eksteren al preterpasantan viron, dika, malalta, alportanta malhelan bluan bereton kaj brunan pantalonon. Kiu divenis tiun mensogon? Kial ni kredis ĝin? Ĉu mi bone >>18

**S**enlima ambicio, senbrida gloramo, troa memfido, jen, mi montras ecojn karakterizantajn homojn plejparte kapablajn je multo, se ne je ĉio!



Tiaj personoj estas ordinaraj admirataj, eĉ ofte amataj; tamen, kiam tiuj ĉi karakterizaĵoj estas akompanataj de troa, arda deziro, ne nur pri la rekono kaj famo, sed ankaŭ pri la mono kaj, precipe, pri la absoluta potenco celanta la

submetigon de la aliuloj, prezentiĝas antaŭ ni persono malaminda, fia, abomeninda!


Mi jam skizis la portreton de la heroo de tiu-ĉi mia rakontado, la portreton de Polikrato el Samoso (Σάμος). Kaj tiu Polikrato estas ne mita, sed efektiva, historia persono, kiu vivis je la mezo de la 6a jarcento a.K.

Li naskiĝis en Samoso, en unu el la plej belaj helenaj insuloj de la Egea Maro (Αιγαίον Πέλαγος), estanta tre proksime al la malgrandaziaj bordoj. Li ne estas mita persono, sed lian biografion markis, imputita al li, mita okazintaĵo, kiu preskaŭ kovris lian, vere notindan, ekonomian, politikan kaj militan agadon kaj liajn sendubajn divers-kampajn atingojn kaj sukcesojn.

Li apartenis al eminenta familio de Samoso kaj ekde sia juneco li estis ambicia, flamema kaj senskrupula. Do, kiam li viriĝis, li sukcesis fari komploton el junaj ribelintoj kaj organizis konspiron, per kiu li renversis la regantojn de la lando; li perforte uzurpis la absolutan povon, li iĝis tirano. Kaj la vorto "tirano" (τύραννος) de la helena lingvo montras ne nur despoton kun absoluta, arbitra aŭtoritato, sed regnestron kruelan, rigoran, senindulgan. Estas pro tio, ke en la helena lingvo estas verbo, derivaĵo de la vorto tirano, kiu signifas ankaŭ turmenti, torturi, opresi.

Tia regnestro iĝis Polikrato kaj tuj li montris sian severecon, eksterminte la pli multajn el siaj kunkonspirantoj kaj forpelinte multajn centojn da personoj kiuj estis certaj aŭ supozaj liaj kontraŭuloj. El siaj du fratoj, kiuj partoprenis la ribelon, la unun li mortigis kaj la duan li dumvive ekzilis. Tiele, ĉiam

agante per mano fera kaj animo frosta, li tute firmigis sian suverenecon, kiu daŭris longe (538-517 a.K.).



Ĉar lia ambicio ne havis limojn kaj ĉar li deziris regi ne nur super la popolo de sia ne tre granda patrujo, li faris kaj efektivigis planojn trorskemajn. Unue li klopodis akiri pli kaj pli fortan militpovon, kaj kiam tio estis farita, li ne hezitis ataki, unue la pli malfortajn kaj pli poste ankaŭ sufiĉe fortajn najbarojn. Tiele, iom-post-iome Samoso iĝis la plej forta lando en la sudorienta Egea Maro kaj plietendis sian ekonomian kaj armean superegecon kontraŭ la pli proksimaj al Samoso insuloj kaj la marbordoj de Malgrandazio.

Li akiris armeon tre fortan. Pagante malavare la plej famajn kaj bonajn specialistojn de la tuta helena lando, li fabrikis kaj posedis la plej taŭgajn armilojn, inter kiuj militŝipojn de nova tipo, triremojn, kies formo donis al ili eksterordinaran rapidecon kaj manovr-facilecon. Tiu unika ŝiptipo, nomita Samena (Σάμαινα) estis la granda atuto de la samosa milit-floto, kiu iĝis nevenkebla en la marmilito.

Samoso post nelonge iĝis tiom riĉa kaj forta, ke ĝi povis sukcese alfronti la plej potencajn, helenajn kaj barbarajn, landojn. Intertempe Polikrato iĝis pli kaj pli aroganta, pli kaj pli impertinenta, sed ankaŭ pli severa kaj malmilda. En sinsekvaj militoj li venkis la Miletanojn (Μιλήσιοι), la Lesbanojn (Λέσβιοι), kaj aliajn insulanojn, ankaŭ la mararmeon de Ciro (Κύρος), granda reĝo de Persujo (Περσία), glora venkinto kaj submetiginto de la potenca kaj riĉega Lidio (Λυδία) de Krezo (Κροίσος) li kuraĝe alfrontis, venkis kaj forpuŝis. Eĉ la plej militforta, nevenkebla helena ŝtato, Sparto (Σπάρτη), ne povis konkeri Samoson, kiam la sparta floto, subtenante la ekzilitajn Samosanojn, longe, preme, sed malsukcese sieĝis ĝin.

La intereso de Polikrato ne limiĝis je la militaj aferoj. Liaj planoj estis ĉiam altinspiraj, do, li organizis riĉan kaj imponan kortegon en kiu li invitadis la plej bonajn, konatajn, kapablajn kaj lertajn specialistojn de ĉiuj fakoj. Vizitadis Samoson la plej famaj, mond-konataj inĝenieroj, arkitektoj, sciencistoj, inventistoj, ĉiaspecaj artistoj, kiuj, kontraŭ eksterordinare riĉa pago, prenis sur sin la taskon ion elpensi, ion konstrui, ion inventi, ion verki, ion ornami. Tiele, Samoso iĝis ankaŭ civilizacie forta, ĝi akiris nekonkereblajn muregojn, bone organizitan, tute ŝirmitan, sekuran kaj tre grandan militan kaj komercan havenon, diversajn fortikaĵojn kaj ĉiaspecajn defend-konstruaĵojn, sed ankaŭ sanktejojn, palacojn, publikutilajn divers-servajn konstruaĵojn kaj multon da artaj kreitaĵoj. Plej notinda





estas la grandioza templo de Hera (Ἥρα), konstruita en la plej granda sanktejo de la tuta tiama mondo, kiu estis plena je diversaj, imponaj altaroj, preĝejoj, ceremoniejoj, ĉiaj kultejoj, ornamitaj per unikaj skulptaĵoj kaj diversaj artaĵoj. Vidindaj restaĵoj de la grandioza templo staras ĝis nun en Samoso, oferataj al la admiro de la nuntempaj sennombraj vizitantoj. Komprenibile, tiu ĉi rakontado ne celas montri la kreaĵojn de Polikrato, tamen estas precipe notinda la, tute savita ĝis nun, unika subtera, 1036metra akvodukto, farita de la inĝeniero Eŭpalino (Ευπάλινος), vera mirindaĵo de la antikva mondo kaj nuntempe Internacia Heredaĵo en la katalogo de UNESCO!

Nu, multon faris Polikrato, li igis sian patrujon laŭ ĉio potenca, tamen, malgraŭ sia gloro kaj vasta rekono, li konservis siajn plej malbonajn ecojn kaj karakterizaĵojn. Li ĉiam estis aroganta, komplotema, monavida, perforta kontraŭ ĉiuj, kruela kaj venĝema, li restis unu abomena kaj malaminda tirano. Tamen lin ne tuŝis la malamo de la aliuloj, li estis bone gardata, en ĉio feliĉa, kaj li ĝuadis sian forton kaj riĉecon. Inter la malmultaj liaj amikoj estis la reĝo de Egiptujo (Αίγυπτος), la faraono Amasiso (Αμασίς). Mi ne scias kio kunligis tiujn du virojn, sed ŝajnas, ke la granda reĝo estimis Polikraton. Amasiso estis homo saĝa, do, vidante la malbonan konduton de lia amiko, ofte, sed vane, lin konsilis esti pli milda, malpli perforta, severa kaj rigora. Krome, vidante la riĉecon kaj la daŭran bonan sorton kaj feliĉon de Polikrato, iam sendis al li leteron, en kiu interalie li skribis jenon: "... mi konstatas, Polikrato, ke vi estas supermezure feliĉa, ke via prospero kaj bonviveco estas daŭra kaj kontinua. Tio maltrankviligas min, ĉar mi bone scias, ke la dioj estas enviemaj, ke ili ne permesas al la mortemuloj ĝui tian felicon. Vi, ja, scias, ke kio estas permesata al la dioj ne estas permesata al la homoj, do, la dioj punas severe la homojn, kiuj longe ĝuas seninter-rompan, plenan feliĉon. Por eviti dian punon,

vi nepre devas sperti malfeliĉon, pensu, do, pri la afero kaj trovu mem la solvon; akceptu mian konsilon, nepre travivu ian malfeliĉon!..."

Tion skribis Amasiso kaj Polikrato, kiu respektis sian saĝan amikon, decidis plenumi ties konsilon. Inter liaj multekostaj juveloj estis belega, peza, ora fingringo. Ĝi estis juvelo rara, sigelringo kun granda smeraldo, farita kaj gravurita de la Samosano Teodoro (Θεόδωρος), unu el la plej gravaj artistoj de la tuta antikv-helena mondo. Tiu Teodoro estis mult-talenta majstro, mekanisto, arkitekto, inventisto, skulptisto, gravuristo kaj oni diradis, ke tiu fingr-sigelo de Polikrato estis unu el la plej belaj liaj kreaĵoj kaj ĉiuj sciis, kiom multe la tirano ŝatis tiun sian juvelon.

Unu matenon, la plej eminentaj personoj de la kortego estis invitataj en la reĝan ŝipon, kiu ekiris, irante al nekonata direkto. Kiam la ŝipo estis marmeze, sufiĉe malproksime de la bordo, Polikrato, en la ĉeesto de ĉiuj siaj surprizitaj amikoj kaj kunlaborantoj elteris sian amatan fingr-ringon kaj forte forĵetis ĝin en la maron!

Li faris tion, kaj tuj li sentis la pezon de sia ago, la pezon de la granda ofero kaj akran animan doloron pro la perdo kaj la definitiva manko de tiom kara havaĵo! La tirano eksplodis en varmegajn larmojn, jen, do, li estis finfine malfeliĉa!

Sufiĉe longe li estis malĝoja, tamen moderigis lian doloron la ideo ke li estas kvita je la dia puno. Komprenibile, li sendis leteron al sia amiko Amasiso kaj informis lin pri la malfeliĉo kiun li spertadis.

Post kelka tempo, lokaj fiŝistoj vizitis la reĝan kuirejon kaj donace liveris al la tirano tre raran, grandan fiŝon, kiun ili kaptis en siaj retoj. Probable, la fiŝistoj de la insulo kutimis oferi al la mastro tiajn rarajn, specialajn kaptaĵojn. Tiel, la ĉefkuiristo de la palaco ricevis la donacon kaj komencis la preparadon de la kuirado. Tamen, kiam li tranĉis la ventron de la fiŝo, li trovis en ĝi ion pezan, li ĝin purigis, kaj jes, en la interno de la granda fiŝo estis la ĵetita en la maron amata fingr-ringo de la tirano!

Komprenibile, la nekredibla novaĵo estis fulme diskonigita en la tuta lando kaj ekster ĝi. Polikrato, senpripense, tute ne maltrankviliĝinte, akceptis la miraklon facilanime kaj li estis tre ĝoja. Tamen, post nelonge, li ricevis leteron de Amasiso, en kiu la faraono skribis, ke ĉar la tioma bonsorto kaj feliĉo de Polikrato nepre altiros tre pezan dian punon, kiu povus tuŝi ankaŭ liajn proksimulojn kaj amikojn, li ĉesas esti plu lia amiko.

La rigora tirano daŭrigis sian sennuban, feliĉan travivadon, sed post kelka tempo, iu Orsito (Ορσίτης), prokuratoro de la persa reĝo Kambizo (Καμβύσης) en

la proksima al Samoso Magnezio (Μαγνησία), sendis al li fidelulon, kun alloga propono.

La Persoj estis malnovaj malamikoj de Samoso, kiun mult-foje, sed malsukcese, atakis, celante ĝin submetigi. Tamen, tiu Orsito, montradis al Polikrato amikan intencon kaj la du viroj estis konservintaj ian komuniĝon kaj komercan kunlaboradon.

Tiam, do, Orsito konfidence konigis al Polikrato sian decidon ribeli kontraŭ la persa reĝo kaj sendependigi Magnezion de la persa povo. Pro tio, li petis de Polikrato azilon, en okazo de malsukceso, sed unue li konigis sian deziron konfidi al li sian nekalkuleblan trezoron el oro, arĝento, gemoj, juveloj kaj mono, por ke ĝi estu sekura ĝis la feliĉa finveno de lia afero. Kompreneble, Orsito promesis al Polikrato tre riĉan rekompencan por la amika komplezo.

La ekstreme monavida tirano, tuj pensis ruze. Unue li bone sciis, ke atenco kontraŭ la persa reĝo nepre fiaskus, precipe ĉar Orsito ne estis sufiĉe forta por alfronti la persan armeon, do, en tia okazo la trezoro de la ribelinto restus en Samoso kaj iĝus posedaĵo lia. Sed, ankaŭ en la neebbla okazo de feliĉa finveno de la ribelo, li povus uzurpi la trezoron, ĉar Orsito neniam povus minaci, eĉ invadi Samoson. Nu, Polikrato kun kontenteco aŭdis la proponon de la Perso, sed, en la komenco, li hezitis, ĉar Orsito sciigis al li ankaŭ, ke li ne povus liveri tian grandan trezoron al servistoj, Polikrato devus iri al Magnezio, por mem preni la trezoron kaj subskribi la necesan kontrakton. Unue, por esti tute certa pri la ekzisto kaj la grandeco de la trezoro, Polikrato sendis al Magnezio sian fidelan sekretarion, Meandron (Μαιάνδριος). Orsito, kiu atendis tion, plenigis dekojn da grandaj feraj kestoj per ŝtonoj kaj sur ĉies supraĵo li metis tavolon da oro, gemoj kaj juveloj. Nur unu keston li plenigis per trezoraĵoj, kaj kiam Meandrio alvenis, la servistoj de la trezorejo malfermis la kestojn kaj nur unu ili tute malplenigis ĉe la piedoj de la surprizita Samosano. Tiel, reveninte al Samoso, Meandrio raportis pri la ekzisto de vere nekalkulebla trezoro, tamen Polikrato ankoraŭ hezitis. Por esti tute certa, li sendis al Magnezio spionojn, sed Orsito, ankaŭ tion atendis, do, per siaj elektitaj fideluloj disvastigis en la agoro famon pri eventuala lia ribelo, kontraŭ la persa reĝo.

Kiam la samosaj spionoj faris sian raporton, Polikrato estis tute certa pri la vereco de la afero, sed li konservadis ankoraŭ kelkajn lastajn hezitojn. Orsito, kiu tre bone sciis la karakteron, precipe la senliman monavidecon de Polikrato, pacience atendis, ĝis kiam la samosa tirano cedis al sia pasio kaj iun tagon, kun granda sekvantaro, ne kun armeo, atingis la malamikan teritorion. La persa, malica, tre bone



organizita indrigo estis tute sukcesa, la nevenkebla malamiko, kvazaŭ muso, estis naive falinta en la kaptilon, do, lia sorto kaj la sorto de Samoso estis jam difinita!

Estas super-flue diri, ke Polikrato spertis kruela turmentan, eksterordinare suferigan mortigon, tian, ke la pli multaj helenaj historiistoj evitis ion mencii.

Tia estis Polikrato, la kruela tirano kaj samtempe genia kreinto de mirindaj faraĵoj. Oni povus longe paroli pri li, diri multon pri lia personeco kaj agado, tamen tio kio restis en la jarmiloj viva, tio, tre impresa, kio kovris ĉion alian, estas la mito pri la forĵetita kaj mirakle retrovita fingr-ringo. Tamen, tio ne ŝajnas al mi stranga, ĉar ĝi pravigas mian kredon, ke la mito estas ĉiam pli alloga ol la realo!

Estas kompreneble, ke Polikrato inspiris multajn verkistojn kaj ĉiafakajn artistojn de ĉiuj epokoj. Estis kreitaj belegaj verkoj, inter kiuj estas balado de la mond-konata germana verkisto, Ŝillero!

Mi staras je tio ĉi, ĉar, tute hazarde, mi trovis en la unua greka Esperanta revuo "Greklingva Esperantano", en numero de 1909, tiun baladon de Ŝillero "La Ringo de Polikrato", en esperant-lingva traduko, farita de la tiama esperantisto Paul Bunemann. Mi ne povis kontraŭstari al la tento prezenti al la legantoj de la "Gemoj" la tradukon de la bela verko, do, mi aparte aperigas ĝin ĉi-sube, tute ne tuŝita de mi.

verkis **Spiros Sarafian** el Grekujo  
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

## La Ringo de Polikrato

esperantigita el la  
germana balado de  
**FRIEDRICH VON SCHILLER**

Li staris sur l' altec' kastela,  
rigardis kun vizaĝo hela  
malsupren sur Samoson sian.

... Jen ĉion tion regas mi",  
al reĝ' egipta diris li,  
... konfesu la feliĉon mian".

... Vin ja favoris Eternulo;  
fariĝis ĉiu egalulo  
regat' nun de la sceptro via.  
Mi unu nur venĝonton timas.  
kaj vin feliĉa ne estimas,  
dum serĉas vin okulo lia".

Apenaŭ oni aŭdis lin,  
jen de Milet' prezentas sin  
sendito al la tiraneg':  
... Preparu, estro!, bonodorajn  
oferojn, kaj de laŭro glorajn  
branĉetojn vindu pro venkeg; !

... De lanco falis malamiko;  
kun gaja tiu ĉi sciigo  
min sendas estro Polidor' "  
Li el baseno nigra prenas –  
ho – kapon sangan, jen ĝin tenas,  
al ĉiu bone en memor'.

La reĝ' rigardon zorgan sian  
vagigas,: - "Ne feliĉon tian  
konfidu, mi avertas vin!  
Sur onda, pensu, malvereco  
naĝadas via multriĉeco;  
facile vent' detruas ĝin."

Apenaŭ flugis for l' parolo,  
jen altĝojegas la popolo,  
la rodon gaje transkriante.  
Kun mastmulteco ŝipoj venas,  
en si trezorojn fremdajn tenas,  
nun hejmolandon riĉigante.

La reĝa gast' treege miras:  
"Feliĉon vere vi kuntiras,  
sed timu nestaremon ĝian!  
Minacas vin kretar' maltima  
kun bataliloj; jam proksima,  
atakos floran urbon vian."

Ĵus flugis tiuj vortoj for,  
de l' ŝipoj jam multobla hor'  
ĝojkrias: "Venko, Samosanoj!  
Batitaj disen per ventego  
pereis Kretoj; post premeĝo  
ni refariĝas liberanoj!"

La gasto sentas mortteruron:  
Da feliĉeco grandmezuron  
la Dio donis; sed timigas  
envio dia multbenitan;  
vivĝojon tute nemiksitan  
por ĉiu homo Li limigas.

"En ĉio same mi sukcesis,  
kaj la favor' neniam ĉesis  
de l' Dio, kiu gardas nin;  
sed nur; - mi karan filon havis;  
lin prenis. Li; mi ĉion pagis  
al sort', vidante morti lin.

"Ĉagrenon do al vi evitu  
la Nevideblan mem invitu  
doloron doni al bonaĵ".  
Neniu antaŭ ni finvenis,  
kiun ĉiame Dio benis,  
kiun gajigis nur riĉaĵ".

Kaj se la Dio ĝin ne donas –  
aŭskultu, dum amik' admonas, -  
ja malfeliĉon mem al — voku;  
kaj vian karan plej trezoron,  
kiu plej ĉarmas vian koron,  
en marprofundon mem ĝin loku!"

De tim' movita li respondas:  
... Feliĉ' plej granda mia fondas

sur tiu ring' ; mi ĝin dediĉas  
al l' Erininoj, kaj mi petas  
pardonon." – Li juvelon ĵetas;  
en onda mar' la ring' perdiĝas.

Proksiman tagon en mateno,  
antaŭ la princon, kun mieno  
plej gaja fiŝkaptisto venas: -  
"Akceptu, estro!, jen kaptaĵon  
de mi tiritan en maraĵon,  
malofte Di' kun tia benas."

La fiŝon kuirist' preparas,  
- - sed ĝojigita jam li staras  
antaŭ la princ' kun gaja kri' :  
... Senlima via la feliĉo!  
Jen el stomako de la fiŝo  
la ringo, kiun portis vi!"

La gast' ektimas, for jam iras: -  
" Mi restos ne, - mi troe miras;  
ne plu amikoj estos ni.  
Vin certe Dio pereigas  
antaŭ kunmort' mi forrapidas".  
- - Turninte, enŝipiĝis li.

TRADUKO, dediĉata al **S-ro D-ro  
Anakreon Stamatiadis**, Samos, la  
pioniro de Esperanto en greklingvaj  
landoj kaj insuloj, per kuraĝa,  
energia, sindonema laboro.

PATRAS, Grekujo  
la 24-an de marto 1909

**PAUL BUNEMANN**

17>> Tial ĝi estas la plej granda delikataĵo surtere.“

En la originalo, la vorto "gui" (fonetike) signifas "valora, aŭ  
esti rigardata grava", sed ne "delikata.“

Vd. de Wang Chongfang:

"Jen kial ĝi estas alte ŝatata de ĉiuj sub la Ĉielo.“

(daŭrigota)



## LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

Helena Vasiljevna ekprenis lian manon, levis al siaj lipoj la palajn fingrojn, kiel antaŭe.  
"Foje, tio revenas el la fundo de l' animo... Sed nenio helpus... Tio estas la volo de Dio... Kolja, amiko mia, karulo mia... ni estas kune, kaj la cetero..."  
Ŝi faris svagan mangeston.

Ili senvorte rigardis unu la alian, serĉante aliajn trajtojn, aliajn ridetojn, funde de la pasinteco, sur siaj maljunaj vizaĝoj...

La ĉambro estis malluma kaj varma.

Helena Vasiljevna proponis:

"Ni prenu taksion; ni iru ien ĉi-vespere, ĉu vi bonvolas? ... Antaŭe estis malgranda restoracio apud Ville-d'Avray\*\*\*, ĉe la bordo de la lago, kien ni iris en 1908, ĉu vi memoras?"

"Jes."

"Eble ĝi ankoraŭ ekzistas?"

"Eble" li diris, levante la ŝultrojn. "Oni ĉiam imagas, ke ĉio detruigas kun ni, ĉu ne? Ni iru vidi..."

Ili stariĝis kaj ŝaltis la lumon.

Tatjana Ivanovna staris meze de la ĉambro, grumblante nekomprenblajn parolojn.

"Ĉu vi restos ĉi tie, Njanjuŝka?" senkonscie demandis Nikolao Aleksandroviĉ.

Ŝi ŝajnis vekiĝi; ŝiaj tremantaj lipoj longe movetis, kvazaŭ pene formante la vortojn:

"Kaj kien do mi iru?" ŝi fine respondis.

Kiam ŝi estis sola, ŝi iris sidiĝi antaŭ la portreton de Jurij. Ŝi fikse rigardis lin, sed pliaj bildoj pasis en ŝian memoron, pli malnovaj kaj forgesitaj de ĉiuj. Mortintaj vizaĝoj, duonjarcentaj roboj, forlasitaj dormoĉambroj...

Ŝi memoris la unuan plendan kaj akran krieton de Jurij...


"Kvazaŭ li jam sciis tion, kio okazos al li" ŝi pensis.

"Ne tiel kriis la aliaj..."

Poste ŝi sidiĝis antaŭ la fenestro kaj komencis fliki la ŝtrumpojn.

Fino de la 6-a Ĉapitro

## Sepa Ĉapitro



La unuaj monatoj de Pariza vivo por la familio Karino estis kvietaj.  
Nur aŭtune, kiam la juna Andreo revenis de Bretonio, kaj necesis pripensi pri establiĝo, komencis manki la mono.

La lastaj juveloj estis jam delonge venditaj. Restis nur eta kapitalo, kiu ebligis vivteni du-tri jarojn... Sed poste?

Kelkaj rusianoj estis establintaj restoraciojn, kabaredojn aŭ etajn komercejojn.

La Karinoj, kiel la aliaj, per sia lasta mono aĉetis kaj meblis butikon en la fundo de korto. Tie ili komencis vendi kelkajn manĝilarojn, kiujn ili sukcesis kunpreni kun si, la punktojn kaj la ikonojn.

Unue, neniu aĉetis ion.

En oktobro necesis pagi la luprezon.

Poste, Andreon oni devis sendi al Nico. La aero de Parizo kaŭzis al li sufokokrizojn.

Ili intencis transloĝiĝi. Oni proponis al ili malpli multekostan apartamenton apud la Porte de Versailles\*, sed ĝi havis nur tri ĉambrojn, kaj kuirejon mallarĝan kiel murŝranko.

Kie loĝigi Tatjanan Ivanovnan?

Ne eblis devigi ŝin supreniri ĝis la sesa etaĝo pro ŝiaj malsanaj kruroj.

Dume, ĉiu monato estis pli malfacila ol la antaŭa. Unu post la alia, la servistinoj foriris ĉar ili ne sukcesis alkutimiĝi al tiuj fremduloj, kiuj tage dormas, kaj nokte manĝas kaj trinkas, kaj lasas la malpuran vazaron sur la mebloj de l' salono ĝis la morgaŭo.

Tatjana Ivanovna provis fari kelkajn laboretojn kaj lavadojn, sed ŝi malfortiĝis, kaj al ŝiaj maljunaj manoj mankis la forto por levi la pezajn francajn matracojn kaj la malsekan tolaĵon.

Tiam la infanoj, senĉese lacaj kaj incititaj, malmilde traktis ŝin, forpelis ŝin :

"Lasu! Foriru! Vi konfuzas ĉion! Vi rompas ĉion!"

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

## Pestaj Tempo

**T**io okazis iam dum pestaj tempo... Reĝo rajdis en la lando por vidi, per siaj okuloj, kiel la homoj vivas. Survoje li atingis maljunulinon.

Ĝi estis nudpieda, vestita per nigraj vestoj kaj apenaŭ moviĝanta de laciĝo. La reĝo bedaŭris kaj prenis ĝin sur sia ĉevalo. Kiam ili atingis la unuan vilaĝon, ĝi volis malsupreniri. Li demandis ĝin:



- Avino, diru al mi vian nomon.

- Mi estas pesto... - diris ĝi.

La reĝo ektimis, ke li sola venigis ĝin kaj petis ĝin esti kompatema.

- Mi prenos nur

kelkajn homojn – promesis ĝi.

Li daŭris sian vojon, sed baldaŭ eksciis, ke ĉiuj homoj en ĉi tiu vilaĝo estis mortaj. Li trovis la peston kaj demandis ĝin, kial ĝi ne plenumis la promeson, kiun donis al li. Ĝi ridis per sia sendenta buŝo kaj diris:

- Mi prenis nur dek...

- Kaj la aliaj?

- La aliaj mortis pro timo...

Tiel estis iam.. La reĝoj persone renkontis la Nigran Peston kaj provis helpi homojn de sia regno.

Nun la pesto ne iras al la homoj, sed al la bestoj. Estas ĉe la ŝafoj kaj kaproj. Neniu vidaas la Nigran peston, sed ĉiuj vidas virojn en blankaj vestoj, kiuj, laŭ ordono, forlasiigas vilaĝojn sen brutaro. Oni diras, ke ili eble volas senhomigi ilin. Sed, tio estas falsaj novaĵoj...

Nun denove estas pesto, sed ĉe la porkoj. Kaj denove ĝi venas en unu post la alian vilaĝon, sed

## verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

multe da vilaĝoj restas sen porkoj. Ĉu pro timo?!...

Mi aŭskultis la paroladon inter du kamparanoj: "Pli bone tiu pesto min mortigu! Kion ni manĝos vintre?"

Li estis senesperiginta, preta ekplori.

- Ha-ha-ha!... Ne timu, la magazenoj pleniĝos per viando de diversaj proksimaj aŭ malproksimaj landoj!...

- Mi vidis la peston per miaj okuloj - diris la alia - Por ke oni ĝin ne konu, la pesto vestis sin per blankaj vestoj... Estis dika... Ĝia armeo estis grandega...

Denove iĝas pestaj tempo, sed ne estas "reĝo" iri kaj serĉi ĝin, ĉar nek la nunaj "reĝoj" marŝas inter la homoj mem, nek la pestoj paŝas piede, nek raportas al iu ajn. Nun la malbeno: "La Nigra pesto faligu vin!", devas ŝanĝiĝi, tiel: "Dio gardu vin de la Blanka pesto!"

Mi aŭskultas kaj pensas, ke eble la pesto zorgas por la homa sano, mortigos bestojn kaj birdojn dum ĝi devigas ilin fariĝi vegetaranoj kaj eĉ veganoj. Mi ne scias, kiel ili konsentos kun farmistoj, fabrikestroj, komercistoj, kiuj perdas siajn profitojn. Aŭ ĉu ĉiuj kune ekpensas ion? Kaj neniu ion ajn perdas, sed gajnas?...




- Kaj nun mi aŭdas - diris la vilaĝano - kiel ridis la Blanka pesto: "Ha, ha, ha... Mi estas ĉiopova, ĉiopova..."

verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

## Festo

## -- verkis kaj sendis Carmel Mallia el Malto

**Niaj problemoj estas emblemoj de nia liturgia vivo dum la ĉiutaga drivo de l' naskiĝo ĝis la morto, kie ĉiu vorto intensiĝas laŭ la sorto de ĉies persona vojo laŭ la ŝtupar' de l'ĝojo aŭ de l' ĉagren-konvojo. Ĉies vivo estu festo, de l' progreso manifesto.**



verkis kaj sendis Carmel Mallia el Malto

## JOHN SHARP DINWOODIE

**L**a jaro 1952 estas aparte rimarkinda jaro en la literatur-historio de Esperanto, Tiam J. Régulo, eldonisto en La Laguna, Kanariaj Insuloj, aperigis libron originale verkitan en Esperanto, kiu ankoraŭ nun, pli ol duonjarcenton poste, estas de multaj rekonita kiel la plej memorinda kontribuo al la originala poezio de Esperanto post Streĉita kordo de K. Kalocsay (1931) La titolo de la libro, Kvaropo, rilatas al la kvar poetoj, kies poemoj konsistigas la libron: William Auld, John Francis, John Sharp Dinwoodie kaj Reto Rossetti. Ili estis Skotoj krom Rossetti, kio estigis la nomon “la skota skolo”. Jam aperis artikoloj en Juna amiko pri ĉiuj krom Dinwoodie. Per tiu ĉi artikolo mi volas iom kompensi tiun neglekton.



**John Sharp DINWOODIE**  
(1904-1980)

Rigardon ĵetis mi al nokto nigra;  
mallaŭte en la malproksim'  
aŭdiĝis krio de ansero migra;  
animon mian skuis tim'.

Teruris tamen min nek la insido  
de l' nokto, nek la birdo-kri',  
sed kvazaŭ en abismon, la ekvido  
en koron de soleca di'.

Solecon lian la natur' spegulas  
en si fidele; ĉiu sent'  
de l' granda universo-kor' modulas  
la tonojn de l' multvoĉa vent'.

Sur la sennombraj montoj de l' eterno

John Sharp Dinwoodie (1904-1980) havis specialan pozicion inter siaj kolegoj, estante dediĉema pastro kiu forlasis literaturan karieron dum la ceteraj daŭrigis verki ĝis sia vivofino. Lia frua okupo pri Esperanto tamen estis konsiderinda: Li kunlaboris en la produkto de la Angla Antologio (1957), kontribuis al Literatura mondo (3-a periodo) kaj estis la unua redaktoro de la Skota Antologio (1978). Li verkis poezion, novelojn kaj recenzojn kaj estis kompetenta kaj fekunda tradukanto, precipe de skota poezio. Liaj originalaj poemoj kolekte aperis en Kvaropo, el kiuj kelkaj reaperis en Esperanta Antologio (1984).

Dinwoodie vivas kiel originala poeto per siaj poemoj en akompano kun siaj tri poetaj kolegoj en la kvaropa kolekto. Oni nur povas bedaŭri, ke li ĉesis verki en Esperanto post tio, ĉar liajn poemojn distingas pensa forto kaj sentema lirikismo, tamen ne en egalaj proporcioj, kion spegulas la komuna titolo

Kastelo el revoj. En ia poemo La Venkonto la forto superregas en la disvolviĝo de la batalo inter la herbo kaj la diversaj aktivaĵoj de la homoj sur la tero: “Disfalos brikoj, ruiniĝos domoj / kaj el la urbruin' formortos homoj”, ĝis

*Malsupren klinu vin: aŭskultu tie  
kiel la herbo ridas ironie ...  
Sonas de horizont' al horizonto  
la rido de la verda mondvenkonto.*

En tiu poemo ne aperas la religia sento de la pastro, kiel en diversaj aliaj poemoj de Dinwoodie, regas tie “la masiva forto de la Naturo primitiva”, kiu venkos en la fino. Tiu penso memorigas pri alia poemo pri la venkanta herbo, de la usona poeto Carl Sandburg, kie la herbo petas tempon, du jarojn, dek

jarojn, por nerekonigebligi la batalkampojn de Waterloo kaj Austerlitz.

La herbo, kvankam “etaĵo magra, verda”, estas potenca, en alia poemo, Al rozpetalo, la poeto alparolas alian etaĵon, kiu ŝajne “nenion valoras” deŝiritan rozpetalon de rozo, kiun la poeto trovas “sur vojo kota”. Li komparas la rozpetalon kaj trovas ĝin el la koto kaj metas sur sekan grundon;

*Permesu do, estaĵo kompatinda,  
ke mi vin levu for de la malpuro  
en kiu ĵetis vin la vento blinda.*

La rozpetalo havas valoron de beleco, eĉ en la koto, eĉ se efemera. Komparo inter la herbo kiel venkonto kaj la rozo kiel suferanto, kiun la poeto volas helpi, rivelas unuflanke malvarman objektivcon, aliflanke varmsemtan subjektivcon. Ne estas dubo, je kiu flanko batas la koro de la poeto.

La naturo estas proksima en la poemoj de Dinwoodie, precipe lia koncerno pri ĝiaj delikataj aspektoj, kiuj ne havas multan ŝancon en la kruda ĉirkaŭmondo. “Vi, eta besto – tro delikata / por vi en ĉi tiu mondo nia” li alparolas la papilion en la poemo Al papilio. Sed al “ĉi tiu mondo nia” reagis ankaŭ la poeto. Kiel atendeble la religio de la pastro klare aperas en iuj liaj poemoj, sed senpovo kontraŭ la



bruteco de la homoj neeviteble akompanas lian sinceran kredon al Dio. En la poemo Kristnasko li verkas pri la naskiĝo de Jesuo kiel komenco de nova pli bona epoko, sed finas pri malespero pri la homoj, kiujn li komparas al sensciaj brutoj:

*Tagiĝo de la nova mondepoko!  
De la kompato, simpatio, amo!  
Seninterese tamen al la trogo  
La bovo sin forturnis de l' infano.*

*Brutmense ankaŭ homoj lin ignoris,  
pri la naskiĝa loko malestimaj,*

*nur tri saĝuloj fremdaj lin adoris,  
kaj kelkaj kamparanoj simplanimaj.*

La poeto John Sharp Dinwoodie plu vivas sur la paĝoj de la fama poemplibro Kvaropo kaj en la mensoj, kiuj memoras lian poezion kiel personan dokumenton pri rimarkinda homo kaj sincera kaj kompetenta poeto.

Juna amiko, majo 2014

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/dinwoodie.html>

## el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

Franco KAFKO (Franz Kafka) \*

Rakontoj

### La subita promenado

**S**e oni vespere ŝajnas definitive decidinta resti hejme, vestis la negliĝon, post la vespermanĝo sidas ĉe lumigita tablo kaj komencis tiun laboron aŭ tiun ludon, post kiu oni kutime iras dormi, se ekstere estas malagrabra vetero kiu faras la hejmrastadon memkomprenebla, se oni nun ankaŭ jam tiom longe pacience eltenis ĉetabile, ke la foriro nepre mirigus ĉiujn, se nun ankaŭ la ŝtuparejo estas malluma kaj la ekstera pordo ŝlosita, kaj se oni nun spite al ĉio, en subita malagrabra sento leviĝas, ŝanĝas la jakon, aperas tuj strate vestita, deklaras devi foriri, post mallonga adiaŭo tion ankaŭ faras, laŭ la rapido, per kiu oni fermfrapas la pordon, kredas postlasi pli aŭ malpli da kolero, se oni retroviĝas sur la strateto, kun artikoj, kiuj respondas per aparta movemo la jam neatenditan liberecon, kiun oni donis al ili, se oni sentas per tiu unu decido ĉian decidivon en si kolektita, se oni ekkonas kun pli granda ol kutima graveco, ke oni havas ja pli da forto ol da bezono por fari kaj elteni la plej rapidan ŝanĝon kaj se oni nun laŭiras la longajn stratojn, - tiam oni estas por tiu ĉi vespero komplete forlasinta la familion, kiu flankeniĝas en la senesteco, dum oni mem, tute firme, nigra pro kontureco, frapante la femurojn malantaŭe, leviĝas al sia vera formo.

Ĉio pliigi ankoraŭ, se oni ĉe tiom malfrua vespertempo vizitas amikon por vidi, kiel li fartas.



Decidoj

**L**eviĝi el mizera stato devas esti facile, eĉ per memtrudita energio. Mi deŝiras min de la seĝo, ĉirkaŭkuras la tablon, movebligas kapon kaj kolon, fajrigas la okulojn, streĉas la muskolojn ĉirkaŭ ili. Kontraŭagas ĉian senton, salutos la tuj venontan A-on impete, afable toleras B-on en mia ĉambro, ĉe C tiras ĉion diratan per longaj glutoj en min, spite al doloro kaj penado.

Sed eĉ se tiel okazas, per ĉia eraro kiu ne povas ne okazi, la tuto, la facila kaj la malfacila, haltos, kaj mi devos cirkle retroturniĝi.

Pro tio restas ja la plej bona konsilo: ĉion akcepti, konduti kiel peza maso eĉ se oni sentas sin forblovata, ne lasi sin delogi al nenecesa paŝo, rigardi la alian per besta rigardo, ne senti penton, mallonge, tion, kio ankoraŭ fantome restas de nia vivo, subpremi per propra mano, t.s. pliigi la lastan tombecan kvieton kaj lasi ekzisti neniun kroman.

Karakteriza movo de tia stato estas la paso de la etfingro sur la brovojn.

### Ekskurso en la montaron

**M**i ne scias," kriis mi sensone, "mi ja ne scias. Se neniuj venas, tiam do venas neniuj. Al neniuj mi faris malbonaĵon, neniuj faris malbonaĵon al mi, sed neniuj volas helpi min. Plenplena de neniuj. Sed tiel ja ne statas. Nur, ke neniuj helpas min -, alie estus bele: nenio krom neniuj. Mi vere ŝatus - kaj kial ne? - fari ekskurson kun societo de nenio krom neniuj. Nature en la montaron, kien do alie? Kiom tiuj neniuj premas sin unu kontraŭ la alia, jen la multaj laŭlarĝe etenditaj kaj interkroĉitaj brakoj, jen la multaj piedoj, disaj je etetaj paŝoj! Kompreneble ĉiuj estas en frako.



Ni paŝas facile, la vento traas niajn interspacojn, kiujn ni kaj niaj artikoloj lasas malfermitaj. La koloj liberiĝas en la montaro! Estas miraklo, ke ni ne kantas."

### La malfeliĉo de fraŭlo

**Ŝ**ajnas kruda sorto, resti fraŭlo, estante maljuna viro kun malfacila digno peti akcepton, se oni volas pasigi vesperon kun homoj, esti malsana kaj el la angulo de sia lito dum semajnoj rigardi la malplenan ĉambron, ĉiam adiaŭi antaŭ la dompordo, neniam apud sia edzino suprenpremiĝi la ŝtuparon, havi en sia ĉambro nur flankpordojn kiuj kondukas al fremdaj loĝejoj, hejmenporti sian vespermanĝon en unu mano, devi primiregi fremdajn infanojn kaj ne devi konstante ripeti: "Mi ne havas", formi sin aspekte kaj kondute laŭ unu aŭ du fraŭloj el la junecaj rememoroj.

Tiel estos, nur ke oni ankaŭ en la realo nun kaj poste aperos tia, kun korpo kaj reala kapo, do ankaŭ kun frunto por frapi ĝin per la mano.

### La komercisto

**E**blas, ke iuj kompatas min, sed mi ne sentas tion. Mia malgranda komerco plenigas min per zorgoj, kiuj dolorigas min interne ĉe la frunto kaj la tempioj, sed sen esperigi al mi kontenton, ĉar mia komerco estas malgranda.

Mi devas fari decidojn por horojn antaŭe, vigligadi la memoron de la domservisto, averti pri timataj eraroj kaj dum iu sezono prikalkuli la modojn de la sekvonta, ne tiajn regontajn inter homoj de mia rondo, sed ĉe nealireblaj loĝantaroj en la kamparo.

Mian monon havas fremduloj; iliaj cirkonstancoj al mi ne povas esti klaraj; la katastrofon, kiu povas trafi ilin, mi ne antaŭsentas; kiel mi povus ĝin deturni! Eble ili fariĝis malŝparemaj kaj donas feston en gasteja ĝardeno kaj aliaj iomete restas ĉe tiu festo dum fuĝo al Ameriko.

Kiam vespere de labortago la magazeno nun fermas kaj mi vidas nun antaŭ mi horojn, dum kiuj mi neniom povas labori por la seninterrompaj bezonoj de mia komerco, tiam mia ekscitiĝo en la mateno foren antaŭsendita sin ĵetas en min kiel revenanta alta tajdo, sed ne eltenas en mi kaj sencele ŝiras min kun si.

Kaj tamen mi tute ne povas utiligi tiun kapricon kaj povas nur hejmiĝi, ĉar miaj manoj kaj vizaĝo estas malpuraj kaj ŝvitaj, la vestaĵoj makulitaj kaj polvaj, mi havas la komercan kaskedon sur la kapo kaj botojn tragratitajn de kestonajloj. Tiam mi paŝas kvazaŭ sur ondoj, klakas per la fingroj de ambaŭ manoj kaj al preterpasantaj infanoj mi karese tuŝas la harojn.

Sed la vojo tro mallongas. Tuj mi estas en mia domo, malfermas la liftopordon kaj eniras.

Mi vidas, ke mi nun kaj subite solas. Aliaj, kiuj devas supreniri ŝtuparojn, ĉe tio iomete laciĝas, devas kun urĝe spirantaj pulmoj atendi, ĝis oni venas malfermi la loĝejan pordon, ĉe tio havas kaŭzon por kolero kaj senpacienco, venas nun en la vestiblon, kie ili pendigas la ĉapelon, kaj nur irante tra la koridoro preter kelkaj vitraj pordoj en sian propran ĉambron, ili estas solaj.

Sed mi estas tuj sola en la lifto kaj rigardas, apogite sur la genuoj, en la mallarĝan spegulon. Kiam la lifto ekleviĝas, mi diras:

"Silentu, retropaŝu, ĉu vi volas en la ombron de la arboj, malantaŭ la fenestrajn drapiraĵojn, en la laŭbovolbaĵojn?"

Mi parolas kun la dentoj, kaj ĉe la laktaj vitroj la ŝtuparaj balustradoj malsupren glitas kvazaŭ falanta akvo.

"Flugu for; viaj flugiloj, kiujn mi neniam vidis, portu vin en la vilaĝan valon aŭ al Parizo, se io pelas vin tien.

Sed ĝuu la elrigardon el la fenestro, kiam la procesioj venas el ĉiuj tri stratoj, ne cedas unu al la alia, miksiĝas inter si kaj inter siaj lastaj vicoj reaperigas la liberan placon. Svingu tukojn, estu terurigitaj, estu kortuŝitaj, laŭdu la belan damon pretere veturantan.

Iru trans la riveron sur la ligna ponto, kapsignu al la baniĝantaj infanoj kaj miru pri la hura' de la mil maristoj sur la fora kirasulo.

Persekutu nur la senpretendan viron, kaj kiam vi puŝis lin en pordovojeton, pri rabu lin kaj tiam, ĉiu kun la manoj en la poŝoj, postrigardu lin, kiel li malĝoje iras sian vojon en la maldekstran strateton.

La dise sur siaj ĉevaloj galopanta polico bridas la bestojn kaj retropremas vin. Lasu ilin, la malplenaĵoj stratoj malfeliĉigos ilin, mi scias tion. Jam ili forrajdas duope, mi petas, malrapide ĉirkaŭ la stratanguloj, fluge sur la placoj."


Tiam mi devas eliri, malsuprenigi la lifton, sonori ĉe la pordosonorilo, kaj la knabino malfermas la pordon, dum mi salutas.

elgermanigis Vilhelmo LUTERMANO el Kubo  
\*\*\* publikigita kun permeso de la tradukanto \*\*\*

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/kafka.html>

\* *Franz KAFKA naskiĝis la 3-an de julio 1883 en Prago, mortis la 3-an de junio 1924 en Kierling [Kierling] (Aŭstrio) estis aŭstra germanlingva verkisto de noveloj kaj mallongaj rakontoj.*

**K**araj samideanoj, ekĝoju! Festu !!  
Ĝojkriuu !!! Nia suferado finfine  
ĉesis!!!



Ni ne plu devos zorgi pri la elĉerpiĝo de la petrolaj rezervoj, pri la danĝeroj de la nukleaj centraloj ! Ni ne vivos kiel en la filmo "Mad Max", luktante inter ni por posedi la lastan cisternan kamionon da nafto !

Mi finfine trovis eternan, ĉiaman, neelĉerpeblan energifonton !! Festu miaj karaj! Festu!!

sendis **Maurizio Brucco** el Hispanio



## El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofa Laocio, fondinto de Taoismo (37) DUA PARTO - LA VIVO

62



**TAŬO estas la hejmlando de ĉiuj,  
kaj la trezoro de la homoj bonaj,  
kaj la protekto de la homoj nebonaj.  
Kun belaj vortoj oni povas prezenti sin  
foirplace.**

**Per honorinda konduto  
oni povas distingi sin de aliaj.**

**Sed kial oni forĵetu  
la nebonajn el la homoj?**

**Tial la reganto estas nomumita,  
kaj la princoj havas sian oficon.**

**Eĉ, se oni havus sceptrojn el juveloj,  
por sendi ilin en festa kvarĉevala ĉaro,  
ili ne valorus tiom, kiom la donaco TAŬO,  
surgenu prezentata al la reĝo.**

**Kial la malnovuloj tiom ŝatis Taŭon?**

**Ĉu ne estas tial, ĉar oni diras pri ĝi:**

**„Kiu petas, tiu ricevas;  
kiu pekas, al tiu oni pardonas?“**

**Tial ĝi estas la plej granda delikataĵo surtere.**

**Rimarkoj de Anniespera:**

Vilhelmo:

"kaj la trezoro de la homoj bonaj,  
kaj la protekto de la homoj nebonaj."

En la originalo, la vorto „bao“ (fonetike) havas kelkajn sencojn, ekz. protekti, konservi kaj tiel plu. Ĉi tie, laŭ mi, ĝi signifas "konservi."

Vd la tradukon de Wang Chongfang:

"Kaj ĝi devas esti konservata ankaŭ de malnovuloj."

Vilhelmo:

"Kun belaj vortoj oni povas prezenti sin foirplace.

Per honorinda konduto oni povas distingi sin de aliaj."

Laŭ mi, pri tiuj ĉi frazoj, la traduko de Wang Chongfang estas pli fidela al la originalo:

"Per belaj paroloj oni povas akiri respekton de aliaj, Kaj per bonaj agoj oni povas doni al aliaj sekvindan ekzemplon."

Vilhelmo:

"Sed kial oni forĵetu  
la nebonajn el la homoj?"

Pri tiu ĉi frazo, mi opinias, ke la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza. Jen:

"Kiel do la Taŭo povus esti forĵetita de homoj, eĉ en iliaj malbonaj agoj?"

Vilhelmo:

"por sendi ilin en festa kvarĉevala ĉaro,"

En la originalo ekzistas tiuj ĉi vortoj: „xian, hou“ (fonetike), kiuj signifas respektive: "antaŭ, malantaŭ", sed ne ekzistas la vorto "en".

Laŭ mi ĉi tie la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

"donace sendi jadodiskon, sekvatan per jungitaro el kvar ĉevaloj."

Vilhelmo:

"ili ne valorus tiom, kiom la donaco TAŬO,  
surgenu prezentata al la reĝo."

Sciu, ne nur al reĝo, sed ankaŭ al la princoj.

Vilhelmo:

"Kial la malnovuloj tiom ŝatis Taŭon?"

Ĉu ne estas tial, ĉar oni diras pri ĝi:

Kiu petas, tiu ricevas;

kiu pekas, al tiu oni pardonas?



Trista, trista ĉiam mi estos  
Pro vi, kiu neniam plu estos  
En la verda Ĉampanio,  
Kie korkrevas mia memoro.

Hej, hej, vi la gruoj,  
Ne tiom voku super la arboj.  
Sonorilo, neniam sonu,  
Se por ni vi ne sonu plu.



verkis kaj sendis  
**Roland Platteau**, el Francio  
(10/6/2002)

Hej, hej, vi la gruoj,  
Ne tiom flugu super la arboj.  
Sonu, sonu, sonorilo,  
En la vesper' sonu, sonu nun.

Hej, hej, vi la gruoj,  
Ne tiom voku super la arboj.  
Sonorilo, neniam sonu,  
Nur por mi vi sonu plu.

bis

Ŝi do restas sola kaj cindra,  
Kompatinda vivuleto mia.  
En la verda Ĉampanio  
Malplenas hejmeĉa ruldomo.

\* Ĉar la venonta turka stelo aperos la 1-an de oktobro, ĵus antaŭ la komenco de la migrado de gruoj (estas pluraj vojoj, la vojo kiu pasas tra Francio kondukas la gruojn de Svedio ĝis Estramaduro en Hispanio, tra, interalie grava haltoloko por ili : la lago Der en Ĉampanio. Alia pli orienta vojo kondukas la gruojn de Rusio ĝis Egipto pasante tra Dobruĝo, la lago Huleh en Galileo, kaj kompreneble Turkujo). Mi sendas tiun poemon/kanton kiu elvokas ĝin.

Pliaj fotoj ĉe: <http://www.ipernity.com/search/photo/@/page:3:20?w=0&q=lac+du+der>

Hej, hej, vi la gruoj,  
Ne tiom flugu super la arboj.  
Sonu, sonu, sonorilo,  
En la vesper' sonu, sonu nun.

bis

Se mi mortus, ĉu mi kun ŝi irus ?  
Ŝin brakumi ĉu mi tie povus ?  
Kiel en verda Ĉampanio,  
Kie estis duopa feliĉo

kantenda laŭ la slava melodio uzita por « Hej, la nizoj » far Jomo.  
<https://www.youtube.com/watch?v=gw5KRPoJTcg>



Foto de Alen Gubert.

Fonto: <http://www.ipernity.com/doc/alain.gobert/9436850>

7>> memoras? Sed tio, pri kio mi certas estas, ke eĉ en miaj plenaĝaj jaroj la vorto Dio (Allah) ĉiam rememorigas min pri tiu viro. Eble infanoj pensas, ke Dio estas konkreta estaĵo...

En alia sceno de la filmo, la memportreto de la artisto metas farbon al unu el la deformitaj skizoj kaj aldonas al ĝi vivon. Ĝuste tiel, kiel Kristo resurektis Lazaron.

Antaŭ nelonge mi parolis kun amiko, kiu estas psikologo kaj ankaŭ spertulo pri mitologio, pri la temo "Kio estas viveco? "Estas diversaj difinoj pri kio estas vivo fiziologie. Sed pensante pli profunde, ĉio ŝajnas stranga kaj absurda.

Hodiaŭ , ni, la raciemoj, kiuj kredas je "materialisma" mondo, kaptiĝas al ombroteatro, al spektaklo de marionetoj, al filmoj, al teatraĵoj, kiuj ŝajne prezentas la veron. Ni alportas la esencon de niaj animismaj prapatroj.

Laguonie la reĝisoro de tiu animacia filmo spertigas nin la emociojn de niaj prapatroj kaj rememorigas al ni pri nia komuna memoro.

Ni, la spektantoj, kiuj antaŭ nelonge estis probableco de spermo kaj zigoto, la linioj kaj farboj, kiuj pli poste gajnis formon, la "kompletigitaj" bildoj, kiuj en sia kastelo establis klasan superecon , la malestimataj skizoj kaj duonpentraĵoj, la batalantaj

soldatoj kaj la tamburisto Magenta, kiu pridemandas militon, Claire kaj Ramo, la amantoj el malsimilaj klasoj... Ni ĉiuj renkontiĝas por spekti ĉi tiun filmon kaj ankaŭ esti spektataj.

En la unua pentraĵo, en la komenco de la filmo, Lola diras:

“Ĉiuj homoj ĉi tie perceptas mondon alimaniere.”

Mi ankaŭ perceptis ĉi tiun filmon laŭ mia propra maniero.

Ni, kiuj spektas ĉi tiun filmon, ĉu ni neniam direktis

al Dio la frazon de Lola, kiun ŝi direktis al la homopentristo? :

“Mi scivolemas pri kiu desegnis vin!”

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo

la 25-a de septembro 2019

Büyükdada

## Nokta Veturo

**E**n la kupeo de la vagonaro sidis nur du personoj: viro kaj juna virino. La virino legis kaj ne rigardis la viron. Li silentis kaj eble dormis. Malheliĝis. La junulino fermis la libron kaj ekstaris. Ŝi metis la libron en sian kofron. La viro ne ekmoviĝis, tamen li ekparolis:

„Kion vi legis?”

„Ĉu vi ne dormis?” demandis mire la virino. En la kupeo jam estis malhele, nenio estis videbla.

„Ne, diris la viro – mi nur ne volis ĝeni vin dum la legado.”

„Mi legis sonetojn de Shakespeare (Ŝekspiro).”

„Ili estas belegaj, ankaŭ mi ŝatas ilin.”

„Vi parolas bone angle”, diris la juna virino, „sed vi ne estas anglo, ĉu?”

„Ne, mi estas ruso, sed mi studis en Anglio kaj poste mi vivis longe en Japanio kaj en Ĉinio.”

„Miaj gepatroj vivis en Hindio”, diris la bela junulino.

„Ankaŭ mi jam vizitis Hindion. Oriento ĉiam interesis min.”

„Bonvolu rakonti al mi ion pri viaj travivaĵoj tie”, petis la virino.

La viro rakontis pri la granda rivero Jan-ĉi-kiang, pri belegaj japaninoj, pri saĝaj hindoj, pri interesaj religioj. Kaj pri tio, kiel li instruis Esperanton en Japanio kaj Ĉinio.

La junulino aŭskultis sen vorto, senmova, ŝia vizaĝo brulis, ŝiaj bluaj okuloj ronde malfermiĝis, tiel interese scipovis rakonti tiu fremda viro.

Li parolis ĝis mateniĝo kaj eksilentis nur, kiam eniris la kondukto.

„Sinjoro, vi jam devas elvagoniĝi, venu, mi helpos vin”, diris la kondukto.

La viro faris malcertan movon – la junulino ekkriis:

„Ho, mi ne sciis, mi ne rimarkis! Ĉu tio povas esti vero? Vi, kiu tiel multe vojaĝis, kiu instruis tiom da homoj, vi, kiu parolis la tutan nokton pri la beleco de la naturo, pri ekzotikaj landoj, vi – vi ne vidas?!”

„Mi estas blinda ek de mia infaneco.”

## -- rakonto de Eva Benická <sup>1</sup> el Slovakio



„Sed kiel vi povis tiel multe vojaĝi kaj labori sola?”

„Mi neniam estis sola, ĉirkaŭ mi estis ĉiam gesamideanoj, kiuj helpis min.”

„Ankaŭ mi volas esti via samideano”, diris la junulino.

La viro ekridetis kaj ĉirkaŭbrakis ŝin.

„Bone”, li diris, „skribu al mi, tio ĉi estas mia adreso. Mia nomo estas Vasiliĵ Eroŝenko.” <sup>2</sup>

La viro forlasis la kupeon kaj la junulino postrigardis lin kun malsekaj okuloj.

detajpis **Hans-Georg** kaj **Dorothea Kaiser**

el **Juna Amiko** n-ro 031 - 1984/1

Fonto : <https://cezarkulturo.blogspot.com/2018/11/eva-benicka-nokta-veturo-rakonto.html>


<sup>1</sup> **Eva Benická** (naskiĝis la 4-an de septembro 1921

en Budapeŝto; Ŝi estis instruistino kaj verkistino. Ŝi ricevis bronzan (1981) kaj arĝentan (1987) insignojn de Slovaka Esperanto-Asocio. Ŝi multe kontribuis en E-periodaĵoj kaj hungaraj gazetoj. Esperantistino ekde 1977, kiam ŝi vizitadis E-kurson gvidata de Lorenzo Bodenlos. Aŭtorino de la lernolibro por infanoj Esperanto Esperante kaj dramigis la fabelon pri Neĝulino kaj sep nanoj. Ŝi gvidis E-kursojn en CSEMADOK, fervojista klubo kaj en bazlernejoj en Koŝice kaj etuloj dum SELKO. Ŝia patro dum la 1-a

mondmilito estis kaptita en Vladivostok (Rusio), kie Julio Baghy instruis Esperanton.

<sup>2</sup> **Vasilij Eroŝenko** (1880-1952) naskiĝis en Rusio. Li pasigis sian vivon en la Ekstrema Oriento, kie li instruis la rusan literaturon kaj Esperanton. Li verkis japane, ĉine kaj Esperante.

## Ŝercoj



- Karulino, ĉu vi scias pli belan vortojn ol:  
„Mi amas vin.”

- Jes, mi konas: „Mi edzinigos vin.”

\*\*\*

La instruisto mallaŭdas knabeton:

- Aŭskultu min. En via aĝo mi ne kuraĝis mensogi.

- Kiom jaraĝe komencis mensogi sinjoro instruisto?

\*\*\*

Kiam al la geedza paro venis la deka-novnaskito la edzo diris al la edzino

- Nun mi scias kie ni eraris.

- Kie?

- La pilolojn devus gluti vi kaj ne mi!

\*\*\*

Brakumita paro sidas sur kanapo.

- Ja kion vi pensas, karulino.

- Same kiel vi - honte respondis la junulino.

- Bonege. Tiam, faru vi, la saman sandviĉon kun ŝinko ankaŭ por mi.


\*\*\*



**Malofta fotografajo de la esperanta akcento falanta sur la antaŭlasta silabo!**

## Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj



### HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. \_\_\_ martelo kaj amboso; 6. En anĝela maniero; 7. Landokodo de Litovio; 8. Mallongigo de Originala Literaturo Esperanta; 9. Montra pronomo; 11. Simbolo por aluminio je kemio; 12. Inter martelo kaj \_\_\_; 14. Kredema, kiel infano.

### VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Ekzistanta tute interne, familiara; 2. Eniĝi sen vokaloj; 3. Azia arbedo (ĉina kamelio); 4. Laksa, nefiksita; 5. Neimaginara nombro; 6. Grandan en vertikala; 10. Zono por fermi la tradiciajn japanajn kimonojn; 13. Mallongigo de Originala Verkaro.

Fonto: Semajno de Enigmoj #4

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)



**F**oje noktomeze mi ĵus finis la artikolon antaŭ longe promesitan al unu ĵurnalo, kies kunlaboranto mi estis. Rektiĝinte en la apogseĝo, mi, kun sento de kontentiĝo interna, ekfumis cigaredon kaj enpenŝiĝis. Ĉirkaŭe regis silento muta, nur ie sub la planko bruotis muso kaj pluvgutoj frapadis de tempo al tempo la feran tegmenton. Dormo persiste logis min en siajn brakojn.

Subite laŭta trudema frapado je la enirpordo tremigis min. En vilaĝo Kuvŝinovo okazis krimo: bubo juna, antaŭ nelonge edzigit, pro koleremo vundis sian patron per hakilo. La vundito pro granda sangoperdo svenis kaj nun, malgraŭ horo malfrua, oni invitis min por komunii lin. Rapide vestiĝinte kaj preninte objektojn necesajn, mi post unu-du minutoj jam sidis en glitveturilo.

Dum frua printempo la nokto estis varma kaj luma, kvankam duono de la ĉielo estis kovrita per nubo, el kiu falis nur maloftaj kaj malgrandaj pluvgutoj. Mia veturigisto – Jakov Petrov, unu el plej malriĉaj vilaĝanoj de la vilaĝo, kunflekŝiĝinte iel nehome en antaŭa parto de la glitveturilo, ekfajfis akrasone kaj lia malgranda malgrasa ĉevalaĉo vikle ekkuris.

Kuvŝinovo estis la plej malproksima vilaĝo en mia paroĥo, kuŝanta en ses verstoj de la preĝejo. Antaŭ nelonge ricevinte tiun ĉi paroĥon, mi vizitis la vilaĝon ne pli ol kvarfoje kaj konis bone nur du-tri ĝiajn loĝantojn en kies nombro estis ankaŭ la veturigisto.

En la komenco de la vojaĝo mi eksciis de la veturigisto pri detaloj de la okazintaĵo kaj, mi konfesas, malvarmo ne unufoje kuris tra miaj membroj.

La ĉevalaĉo kuris ne longe. Baldaŭ la vojon ekbaris sennombraj kavoj kaj riveretoj, ofte neĝo malkompaktiĝinta ne povis elteni pezecon de la besto kaj ĝi trafaladis profunde jen per unu piedo, jen per la alia. Fajfado, krioj, eĉ vipbatoj helpis malbone – nia glitveturilo apenaŭ moviĝis antaŭen. La tempo malfrua, laceco kaj enuo, inspirita de la veturado malrapida, venkis min kaj mi ekdormis.

Ĉu mi longe dormis, mi ne scias. Kiam mi levis la kapon kaj malfermis miajn okulojn, mi longe ne povis konjekti, kie mi estas. Super mia kapo tra nebulo maldensa briletis steletoj malklaraj, malsupre je ambaŭ flankoj estis vidataj la senordaj vicoj de nigraj arbetoj, ĉirkaŭitaj per nigra akvo kaj post ili ie malproksime kuŝis, kiel vestaĵoj fantaziaj de fantomoj, la neĝamasoj.

Rigardinte pli atente, mi rimarkis kun miro, ke la ĉevalaĉo laca staris senmove en la akvo ĝis la genuoj mem. La veturigisto forestis. Nenie estis ia signo de la

vojo.

Mia situacio estis neenviinda: sen la veturigisto mi ne povis ien direkti la ĉevalon, ĉar, tute ne sciante la lokon, mi povus facile trafi en ian marĉon aŭ profundaĵon kaj pereigi la beston; – lasi la glitveturilon kaj daŭrigi la vojaĝon piedire mi ne povis ankaŭ. Kion fari? Kion entrepreni?

Singarde rektiĝinte, mi ĉirkaŭrigardis, esperante revidi la malaperinton, sed kien ajn mi rigardis, ĉie mi vidis nur nigran akvon kaj nigrajn siluetojn de arboj. Pro ĉagreno mi ekvipis la ĉevalon, ĝi ekstremis, svingis la kapon. Vipita duafoje, ĝi ekbatis kolere la akvon per la piedo kaj ŝprucigis sur mian vizaĝon fontanon de akvo malvarma. Mi ĵetis la vipon kaj laŭte ekkriis:

– Jakov!.. Kie vi estas?.. He-e!..

Eĥo, kiel tondro, eksonis super la ebenaĵo akva. De proksima arbo leviĝis ia granda birdo maltrankviligita kaj, malfacile svingante per siaj flugiloj, farinte rondon en la aero, ĝi malrapide malaperis en la nebulo densiĝinta. Kaj ree ekregis silento.

Supozinte, ke la veturigisto foriris por trovi la vojon, mi, pli bone kovriĝinte per fela sutano, decidis paciencie atendi lian revenon. Kompreneble, li ne povis malaperi senpostsigne.

Mi atendis ne longe. Baldaŭ aŭdiĝis akvoplaŭdado kaj el post la arbetoj aperis silenta figuro de Jakov. Li estis tute malseka. Sidiĝinte sur la randon de la glitveturilo, li ne rapidante formetis siajn botojn tute trankvile, kvazaŭ ĝi estis lia plej ordinara afero, renversis ilin kaj elverŝis la akvon.

– Ni perdis la vojon!.. – li diris kun mieno malkontenta. – Mi serĉis, serĉis la vojon – ne trovis!.. Apenaŭ kun Dia helpo mi retrovis vin. Mi pensis jam, ke mi mortos tie en marĉo... La loko estas tute nekonata. Certe ni trafis la lokon malbonfaman?.. Nun ni restos ĝis la mateno: ĉe matenlumo ni difinos la lokon kaj trovos la vojon.

Lia trankvileco indignigis min.

– Kiel? Ni restos tie ĉi malsekaj, ĝis la mateno?.. Ni povas malvarmumi!.. Kaj nia vundito?... Li mortos nekomuniita!..

– Kiel vi volas, patro! Sed sciu, ke tute egale – ĝis la mateno ni ne trovos la vojon. Ni troviĝas en la loko ensorcĉita...

– Kion vi babilas?.. Kia loko ensorcĉita?.. Ĉu vi frenezigiĝis? Instigu la ĉevalon!..

Jakov skeptike balancis la kapon, ekvipis la ĉevalon kaj ree kunflekŝiĝis kiel erinaco. Sub batoj de la vipo la ĉevalaĉo ekiris apenaŭ movante la piedojn. La akvoŝprucoj, kiel pluvo somera, falis sur nin. La glitveturilo jen flue naĝis sur supraĵo de la akvebenaĵo,

jen, tuŝinte ŝtipon, haltadis kaj, kliniĝinte flanken, minacis elfjeti nin en la akvon. Ni veturis longe kaj hazarde, sole fidante al instinkto de la besto. Branĉoj nudaj de arbetoj senkompate vipis niajn manojn kaj vizaĝojn. Jakov senmove sidis sur sia loko kaj obstine silentis, de tempo al tempo formetante sian ĉapon kaj farante la krucosignon.

– Dio nin gardu!.. – li diris post longa paŭzo. – Ĉu vi, patro, aŭdas, ŝajne iu krias?.. Oni parolas, ke ĉiunokte ŝi krias... Mi timas...

– Kiu ŝi estas?.. – mi demandis kun rideto skeptika sur la lipoj.

– Nek la loko, nek la tempo, kara patro, permesas rakonton similan. En tiu loko vagas ŝi... animo ŝia neniam trankvila. Se iu, ekz. nun ni, venos nokte, ŝi nepre timigos per siaj ĝemoj kaj krioj ĝis la mateno... lafoje ŝi penas eĉ pereigi vaganton en ia ŝlimejo aŭ marĉo senfunda... Nur la preĝo kaj... Jen ree estas aŭdata krio!..

– Mi aŭdas nenion... Hontu, vi estas ne knabo malgranda..!

– Vi, patro, nelonge vivas ĉe ni, do vi ne scias... Dio nin gardu!.. – li diris per rapida parolmaniero kaj, ree farinte la krucosignon, ekkriis:

– Trankviliĝu!.. Ni estas homoj... diaj.

– Kredeble ie krias noktbirdo kaj vi jam estas pretaj kredi superstiĉe al fabeloj virinaj pri iaj animoj vagantaj...

– Vi scias nenion... Tamen, kiel laŭte ŝi krias!.. Kredeble nun eĉ vi aŭdas, patro?..

Efektive, ia sono neordinara atingis mian aŭdon. Ŝajnis, ke jen iu pereas kaj petegas pri helpo, jen iu, simile al ni, perdinte la vojon krias, esperante trovi proksime lokon loĝatan. Nekutimaj impresoj, travivitaj dum la vojo, mistera humoro de la veturigisto kaj nokta tempo kreis ian fantazian elementon. Baldaŭ la krio ripetiĝis ie proksime antaŭ ni kaj post nelonge ree ripetiĝis kun nova forto jam flanke de ni. Ŝajnis, ke efektive ia animo malbona flugas supere jen tien, jen aliloken por timigi nin. La krio sonis ĉiam pli ofte kaj pli laŭte. Nun jam estis klare, ke krias homo, kvankam liaj vortoj estis nekompreneblaj. La veturigisto tremis pro timo, kiel tremolfolio dum vento, kaj kriis: – Ni estas diaj!.. Trankviliĝu!.. Ni estas homoj diaj.

Iom post iom la timo ekpenetris eĉ en mian koron kaj stranga antaŭsento de proksima danĝero kunforĝis miajn membrojn. Vane mi penis trankviliĝi, vane fikse rigardis: pro densa nebulo ĉio prezentis unu nepenetreblan grizan makulon. Havante nek pafilon, nek eĉ bastonon, mi pugnis la manojn por renkonti malamikon ne sendefende.

Ĝuste tiumomente en kelkpaŝa distanco ripetiĝis la krio kaj aŭdiĝis ies paŝoj, sur la glaciigita neĝo. Teruro

kripligis la vizaĝon, la manoj instinkte malpugniĝis kaj mi ankaŭ ekkriis tutforte:

– Ni estas diaj!.. Ni estas homoj diaj!..

Samtempe la ĉevalo haltis, kaj antaŭ mi subite aperis iu. Lia vizaĝo kaj korpo estis kaŝitaj en la nebulo, nur manoj longe etenditaj super nia glitveturilo, ŝajne, petegis pri io.

– For!.. Mi mortigos vin!.. – kriis la veturigisto.

– Malaperu!.. Ni estas diaj!.. – mi ripetadis furioze la vortojn de la veturigisto.

Kiom da tempo tio daŭris, mi ne scias; same mi ne scias kio okazus se mi havus ian armilon.

– Patro Johano! Ĉu estas vi?.. Ne timu!.. Ĉu vi ne rekonis min?.. Mi estas via konato... eks-poŝtisto Vasilij Sergeič el Arĥangel...

Kvazaŭ granda monto falis de miaj ŝultroj, kiam mi ekaŭdis lian parolon bone konatan. Sur la vizaĝo aperis ŝvito varma kaj ia nekomprenebla nefalsita ĝojo anstataŭis la antaŭnelongan teruron.

La veturigisto ne tuj trankviliĝis. Li longatempe esploris la renkontiton per ambaŭ manoj kaj ne pli frue permesis sidiĝi en la glitveturilon ol dirinte antaŭ lia vizaĝo la preĝon por forpeli diablon kaj trifoje farinte la krucosignon super li. La renkontito, simile al ni, perdis la vojon. Longan tempon vagante tra la marĉoj senfinaj, li malsekiĝis, kiel spongo, kaj tremis pro malvarmo. Feliĉe post nelonge la ĉevalo trovis ian vojon, baldaŭ alkondukintan nin en Kuvŝinovon. La vunditon mi trovis ankoraŭ en konscio kaj komuniis lin.

Gastama Jakov liveris al ni sekajn vestojn kaj plifortigis nin per varmega teo kaj brando. Lia malgranda varma ĉambreto, kun karbiĝintaj muroj kaj plafono, post nia longa vagado meze de malvarmeo kaj malsekeco, ŝajnis al ni vera paradizo. Drinkinte po tri-kvar glasetoj, ni varmiĝis, forgesis antaŭnelongan timon kaj gaje interparolis. Vasilij Sergeič ankaŭ nenion sciis pri malbona reputacio de la loko ĵus vizitita, kaj la mastro volonte rakontis al ni pri ĝi:

Antaŭ longe, dum la epoko de servuto en la vilaĝo najbara estis bieno de severa grafo Zmiev. Li estis fama per sia krueleco kaj senkoreco. En la sama vilaĝo loĝis fraŭlino Zoja – knabino neordinare bela. Ŝi havis fianĉon – ankaŭ samvilaĝan forĝiston, kiu amis ŝin ĝis sinforĝesemo. Iliaj gepatroj estis kontentaj pri elekto de siaj infanoj kaj nur atendis senpacience la aŭtunon, por ke, fininte kamplaborojn, aranĝi la edziĝofeston. Venis, fine, la dezirata aŭtuno. Oni finis ĉiujn vilaĝajn laborojn kaj ekripozis post longa senĉesa laborado.

Laŭ la kutimo, ekzistinta dum tiu ĉi tempo kruela, la gefianĉoj devis antaŭ la edziĝo viziti sian sinjoron, peti lian konsenton por estonta edziĝofesto kaj prezenti al li donacojn. Kun koro timpremita, malkuraĝe ekiris la

gefianĉoj al la domo de la grafo. Sur lia korto staris kelkaj veturiloj de najbaraj bienhavantoj – sinjoroj eminentaj, amasiĝis geservantoj kaj el la fenestroj de la domo sonis gaja kantado kaj muzikado. La grafo baldaŭ sciigis, ke venis al li la gejunuloj kaj ordonis tuj venigi ilin.

Unuavide la beleco de Zoja forlogis la grafon kaj ŝia sorto estis decidita senrevene. Kolere sulkiginte la brovojn, la grafo ekkriis kontraŭ la forĝisto senkulpa kaj aro de servantoj kun moko kaj laŭta fajfado forpelis lin de la korto. La knabino, decide rifuzinta partopreni en orgioj de la, sinjoro kaj lia gastaro ebria, post longa senfrukta admono estis vergita kaj dum la proksima nokto senhonorigita de ili.

Oni enŝlosigis la mizerulinon en la ĉambro malvasta kaj nudigis ŝin, por ke ŝi ne forkuru. Tamen foje ŝi decidis forkuri hejmen al sia amato. Trovinte ie longan ŝnuron, ŝi, tute nuda, nokte malsupreniĝis tra fenestro. Malfeliĉe ŝia forkuro estis baldaŭ rimarkita. Granda amaso de servantoj sinjoraj kun hundaro estis sendita ĉiudirekten por trovi kaj revenigi Zoja'n. En densa marĉa arbetaro oni atingis ŝin. La krio korŝiranta, petanta la kompaton, miksiĝis kun hunda bojado kaj malmodesta insultado de la malĉasta bando. Lastamomente, kiam ŝajnis, ke restis nenia espero pri ies helpo aŭ defendo, kiam la hundoj furiozaj estis pretaj sin ĵeti al la nudulino kaj disŝiri ŝin, de ie subite aperis la fianĉo. Kelkaj vortoj karesemaj, mallaŭte elparolitaj al ŝi, sukcesis tuj trankviligi ŝin kaj,

pli frue ol la hundoj ekkaptis ŝin, li baris ŝin per sia figuro fortega. Poste li enbrakigis ŝin kaj laŭte ekkriis: – Trankviliĝu!.. Ni estas diaj!..

En la sama momento dentoj de la hundoj eniĝis en la korpojn de la gefianĉoj. La grafo, informita pri la okazintaĵo, venis mem por rigardi la mortintojn. Li volis liberigi la korpon de la knabino el la brakoj de la amato, sed ĉiuj penoj estis vanaj: iliaj manoj, kvazaŭ feraj, estis nedisigeblaj.

Longan tempon iliaj korpoj kuŝis tie ne enterigitaj, ĝis kiam ia piulo entombigis ilin en la sama loko.

De tiam, – finis la rakontanto, – ĝis nun ŝia animo vagas ĉiunokte tra la arbaroj kaj marĉoj apudaj. Ŝiaj ĝemoj kaj krioj aŭdiĝas senĉese, jen petante la preĝon, jen minacante la venĝon. Estas malfeliĉa tiu homo, kiun ŝi renkontos sur sia vojo: ĝis la tagiĝo li ne trovos la vojon perditan, se li ne pereis pli frue en ia marĉo.

Nur, memore pri la amato, ŝi indulgas, kiam oni ripetas liajn vortojn lastajn: – "Trankviliĝu!.. Ni estas diaj!.."

verkis **Ivan Genadieviĉ ŜIRJAEV** el Rusio

Aperis en La Ondo de Esperanto 1912, ankaŭ ĉe Sezonoj 1992

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/noveloj/03.html>

## La morto de la rusa virino <sup>1</sup>

**N**ina F., el Moskvo. Edzinigita al albana oficiro en la jaro 1959. Post la vortoj : Ja l'jubilju vas! (Mi amas vin!), sekvis la promenadoj en la parko Gorkij, la telefonadoj el la telefonbudoj kovritaj je neĝo, la promesoj "vi ne forgesos min, ĉu ne" ..ktp.ktp. Ĝis la momento kiam oni petis ŝin: ĉu vi, civitanino Nina F. akceptas A.D. kiel edzon, kaj poste la signoj, interŝanĝo de fingroringoj, alveno en Albanion kaj la miela monato tie.

Nun ŝi kuŝas en la ĉerko meze de la ĉambro de la apartamento, miloj da kilometroj for de sia lando. Jam pasis jaroj ekde ŝi ne ricevis leterojn el siaj proksimumoj (la leteroj ja estis tre raraj post la rompiĝo de interrilatoj, dum lastajn jarojn ili preskaŭ ĉesis). Ŝi ne estas sciinta ekzakte kiu estas mortinta kaj kiu ankoraŭ vivas en sia familio, samkiel ankaŭ ili ne ekscios ekzakte neniam ĉu ŝi envere mortis jam, des malpli sian mortojaron.

Ĉirkaŭ la ĉerko aro da virinoj priploras ŝin en fremda lingvo. Estas ili la fratinoj de la oficiro, jam maljuniĝintaj. Pro la kaptuko kun floroj sur ties kapo, ili similas pli al rusinoj kaj tio plue igas pli trista la

ploradon en fremda lingvo.

Malofte virino estis priplorata de siaj bofratinoj tiel malĝojege. Tiu penso kvankam ne diras voĉe, sentiĝas tuje. Tiel kiel oni sentas la eksplikon pri ĝi: oni priploras unuavice ŝian solecon. Kaj certe ankaŭ la sian.

Dekstre de la ĉerko, post la dorso de virinoj, staras libroŝranko. Inter la titoloj okulfrapas la libroj temantaj la rompiĝon kun Sovetunio, ĉefe la politikaj libroj de la landa gvidanto. Inter ili kaj la rusa virino kuŝanta en la ĉerko estas la ploreco de la virinoj.

La horo de la entombiĝo proksimiĝas. La moviĝo en apartamento fariĝas pli densa, oni alportas la ĉerkokovrilon, tondras la najloj fiksantaj ĝin. Post iome la busoj kun la funebraj homoj veturas al la okcidenta tombejo de la urbo.

Estas humida, pluva tago. Tamen neniu forlasas la tombejon antaŭtempe. Unu virino, membro de la prezidantaro de Fronto de la dombloko elparolas koncize, dirante ke Nina F. estis bona patrino kaj edzino, samkiel diligenta laborantino, kiu prikonsideris



-- esperantigis Bardhyl Selimi el Albanio



en sia laboro ĉiamtempe la instruojn de la Partio kaj de la ties gvidanto.

Nenion pri ŝia nacieco, tiun naciecon kiu estis doninta al ŝi plej grandan solecon imageblan.

"Adiaŭ, Nina!"

Ĉi tiuj estas la solaj naturaj vortoj eldiritaj de la membro de la prezidantaro de Fronto.

Sed pli natura ol ili estas ja la bruo de la koto kaj la ŝtonetoj falantaj sur la ĉerkon, je universala lingvo, multe pli kompreneblaj ol tiuj de la homoj, kvankam la tombon por la mortinta virino donas ne la vasta rusa tero, sed la malvasta albana grundo, kiu apenaŭ sufiĉas por la tomboj de siaj propraj landanoj.

rakonto de **Ismail Kadare**  
esperantigis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

*1 Dum la 15 jaroj da amikeco kun Sovetunio (1945-1960) miloj da albanaj gejunuloj estis senditaj al Sovetio ankaŭ por studado. Parto el ili eĉ edziĝis al la tieaj knabinoj, kiuj estis ĝenerale tre kleraj kaj specialistinoj en diversaj kampoj. Sed post malamikiĝo kun la granda socialista lando, la reĝimo de Enver Hoxha en Albanio persekvadis la sovetianinojn diversmaniere. Multaj el ĉi tiuj eĉ enprizoniĝis, interniĝis, dum la aliaj estis forpelitaj de la lando. Nur tre malmulte el ili plurestis. La rakonto verkita en la jaro 1985 (kvin jaroj antaŭ la ekfaliĝo de la totalisma reĝimo en Albanio) temas pri la morto de rusino edzinigita al albano.*

## La nuna homaro atingis la finon de evoluo komenciĝas malevoluo

-- verkis **Zlatko Tišljar** el Kroatio

**L**a darvina teorio de evoluo kun natura selekto validas. Provoj nuligi tiun teorion estas malseriozaj. Oni ja trovas ostojn de diversaj antaŭhomaj evolustadioj multe pli aĝajn ol ili meritus laŭ lineara logiko de la evoluo, sed tio estas simple klarigebla. Pluraj homtipaj prahomoj atingis evoluon multe pli frue ol tiuj kiujn ni konis, sed tiuj ĉesis pro iu natura kastrofo, do iom post iom la evoluo atingis homo sapiens-on. Kaj nur kiam homo-sapiens atingis la evolupunkton en kiu komenciĝis la socia vivo kaj ekestis skribo, ekestis tute nova stadio en la evoluo entute. La fazo en kiu antaŭaj generacioj transdonis siajn sciojn al la postaj kaj tiuj konstruis novajn sciojn. Tiu transporto de scioj de unu generacio al la posta ebligis la evoluon de homa socio multe pli rapide ol estus per simpla evoluo kun natura selekto. Kaj jen post iom pli ol 10.000 jaroj la homaro atingis stadion kiu montras elementojn de fino de evoluo. Per nia scio kaj egoismo de nacioj ni rapidege celas al du nehaltigeblaj malevoluaj procedoj. Unue ni detruas la ĉirkaŭaĵon pro kiu jam malaperis preskaŭ 50% de ĉiuj vivestaĵoj kaj due: la homa socio produktas denove senlime la plej terurajn armilojn (nukleajn) kaj frenezajn naciismajn politikojn.

Estas demando kiam aŭ la naturo tiom katastrofece komencos ataki la homaron (tro da poluo kaŭzos veterkatastrofojn kaj malsanegojn pro malpura akvo kaj aero) ke ĝia evoluo ĉesos, aŭ la homaro mem detruos la kompletan civilizon per nuklea milito.

Kio sekvos?

Sekvos malevoluo. La detruita civilizo havos multe pli katafstrofajn konsekvencojn ol detruita romia civilizo kiun oni devis rekonstrui 2 mil jarojn. Pro detruita homa civilizo eĉ se ne ĉiuj homoj mortos, restos nur kelkaj nekapablaj rekonstrui ion ajn, krome rapidiĝos la detruo ĉe ĉiuj bestoj kiuj nuntempe adaptiĝis al la vivo de homo kaj ne plu kapablas mem travivi, la malsanoj ne plu estos kontraŭbataleblaj kaj daŭros malevoluo. Logike ĝis malapero de ĉio viva. La Tero iĝos kiel Marso



verkis **Zlatko Tišljar** el Kroatio

Fonto: <http://www.ipernity.com/blog/pajo.zlatko/4726724>

**V**i estis iranta al via hejmo, kiam vi mortis. Ĝi estis aŭta akcidento. Nenio precipe rimarkinda afero eble, sed tamen mortiga. Vi lasis edzinon kaj du infanojn post vi. Estis sendolora morto. La Unua Helpo Teamo faris ĉion por savi vin, sed ĝi ne utilis. Via korpo estis tiel frakasita, ke tiel estas pli bone, kreu min.



Kaj tiel vi konatiĝis kun mi.

“Kio... kio okazis?” vi demandis. “Kie mi estas?”

“Vi mortis”, mi diris rekte. “ne indas paroli plue”.

“Estis... unu kamiono, kies radoj estis glitantaj...”

“Jes”, mi diris.

“Mortis?... Ĉu mi mortis?”

“Jes. Sed ne malĝoju pri tio. Ĉiuj mortas”, mi diris.

Vi ĉirkaŭrigardis. Estis nenieco. Nur vi kaj mi. “Kie ni estas?” vi demandis. “Ĉu ni estas en posta vivo?”

“Pli-malpli”, mi diris.

“Ĉu vi estas Dio?” vi demandis.

“Jes”, mi respondis, “Mi estas Dio”.

“Miaj gefiloj... mia edzino...”, vi diris.

“Kio pri ili?”

“Ĉu ili fartos bone?”

“Jen kion mi ŝatas vidi,” mi diris. “Vi ĵus mortis kaj via ĉefa zorgo estas pri via familio. Ĉi tiu estas bona afero.”

Vi kun miro rigardis al mi. Por vi, mi tute ne similis al Dio. Mi aspektis nur vira. Aŭ eble ina. la obskura figuro de aŭtoritato... eble. Mi similis al instruisto de internulejo ol al ĉiopova estaĵo.

“Ne zorgu,” mi diris. “Ili fartos bone. Viaj gefiloj memoros vin kiel perfekta viro, por ĉiam. Ili ne havis sufiĉan tempon por malestimi vin. Via edzino multe ploras de la ekstero, sed interne ŝi malstreĉiĝos. Honeste, via geedziĝo estis detruiganta. Tamen se tio konsolus vin, ŝi sentos grandan kulpon pro sia malstreĉiĝo”.

“Ho”, vi diris. “Do kio okazos nun? Ĉu mi iros al paradizo, aŭ al ia infero?”

“Neniu el ili!” mi diris. “Vi reenarniĝos.”

“Ha”, vi diris. “Do, la hinduoj pravis.”

“Ĉiu religio pravas siamaniere”, mi diris. “Promenu

kun mi”.

Vi akompanis min, dum ni trairis la neniecon. “Kien ni iras?”

“Fakte nenien,” mi diris. “Estas bele promeni dum ni parolas”.

“Do, kiu estas la signifo de ĉio ĉi?” vi demandis. “Kiam mi renaskiĝos, mi estos kiel blanka paĝo, ĉu ne? Mi estos infano. Do ĉiu mia sperto de mia tuta lasta vivo ne plu havos signifon”.

“Ne tiel!”; mi diris. “Vi jam havas ĉiujn konojn kaj spertojn de viaj antaŭaj vivoj. Vi simple ne memoras ilin ĝuste nun”.

Mi haltis kaj tenis vin el viaj ŝultroj. “Via animo estas pli granda, bela, kaj majesta, ol vi povas imagi. La homa menso povas nur enteni etan frakcion de via ĉeesto. Ŝajnas al meto de fingro en akvoglason por senti ĉu la akvo estas varma aŭ malvarma. Vi forlasas etan parton de vi en la glaso, kaj kiam vi elprenas ĝin, vi gajnas ĉiujn sperton, kiun ĝi havis.

“Vi estis en homa korpo dum la lastaj 48 jaroj, do vi ankoraŭ ne sukcesis eksenti la ceteron de via grandioza konscio. Ĉu vi restus ĉi tie sufiĉe longe, vi ekmemoros ĉion. Tamen ne estas racio por fari tion post ĉiu via vivo.”

“Do, kiom da fojoj mi reenarniĝis?”

“Multajn, kaj eĉ pli multajn. Kaj en multajn malsamajn vivojn vi renaskiĝis”, mi diris. “Ĉi-foje, vi renaskiĝos kiel ĉina kampara knabino en la jaro 540 p.K.”

“Atendu... kio?” vi diris kun miro. “Ĉu vi sendas min al pasinteco?”

“Nu, mi supozas, ke jes, teknike. Tempo, kiel vi ĝin konas, nur ekzistas en via universo. Aferoj estas malsamaj tie, de kie mi venis”

“De kie vi venis?” vi demandis.

“Ho jes”, mi klarigis. “Mi ankaŭ venas de ie. De ie alie kompreneble. Kaj estas aliaj kiel mi. Mi scias, ke vi volas scii pli pri tie, sed sincere, vi ne komprenus”

“Ho”, vi diris, kun iom seniluziigo. “Sed momenton... Se mi reenarniĝas en aliaj lokoj kaj aliaj tempoj, mi eble iam kaj ie ankaŭ kontaktis min mem”.


“Certe. Vi ĉiam travivas tion. Kaj pro tio, ke ĉiu de viaj vivoj nur estas konscia pri si mem, vi eĉ ne ekkomprenas, ke tio okazas”.

“Do, kiu estas la signifo de ĉio ĉi?”

“Ĉu vere?”, mi demandis. “Ĉu vere? Ĉu vi demandas al mi pri la celo de vivo? Ĉu tiu ne estas iom triviala demando?”

“Nu, sed ankoraŭ racia demando”, vi insistis.

Mi rigardis vin en la okuloj. “La celo de vivo, la kialo, ke mi konstruis ĉi tiun tutan universon, estas por



ke vi maturiĝu”.

“Ĉu vi celas diri de la homaro? Ĉu vi volas, ke ni maturiĝu?”

“Ne... nur vi. Mi konstruis ĉi tiun tutan universon por vi. Pere de ĉiu nova vivo vi kreskas, maturiĝas kaj vi fariĝas pli granda, pli bona intelekto”.

“Nur mi? Kaj kio pri ĉiuj aliaj?”

“Estas neniu alia”, mi diris. “En ĉi tiu universo, estas nur mi kaj vi”.

Vi rigardis al mi senesprime. “Sed ĉiuj homoj en la tero...”

“Ĉiuj estas vi. Malsamaj vivoj de vi.”

“Atendu. Ĉu mi estas ĉiuj?”

“Nun vi ekkomprenas!”, mi diris, kaj gratule frapetis vian dorson.

“Ĉu mi estas ĉiu ajn homo, kiu iam ajn vivis?”

“Aŭ vivos... Jes”.

“Ĉu mi estas Abraham Lincoln?”

“Jes, kaj vi ankaŭ estas John Wilkes Booth”, mi aldonis.

“Mi estas Hitlero” vi diris, kun abomeno.

“Kaj ankaŭ la milionoj da homoj, kiujn li mortigis.”

“Ĉu mi estas Jesuo?”

“Kaj ĉiuj, kiuj lin sekvis estas vi”.

Vi eksilentis.

“Kiam vi torturas iun”, mi diris “vi torturas vin mem. Ĉiujn komplezon, kiujn vi faras, vi faras al vi mem. Ĉiuj feliĉaj kaj malgajaj momentoj sentataj de iu ajn homo, estas sentataj de vi.”

Vi iom longe pripensis.

“Kial?”, vi demandis al mi. “Kial vi faras ĉion ĉi?”

“Ĉar vi iam fariĝos kiel mi. Ĉar tiel vi estas. Ni estas samspecaj. Vi estas mia infano”.

“Hu!”, vi diris nekredeme. “Ĉu vi celas diri, ke mi estas Dio?”

“Ne. Ankoraŭ ne. Vi estas embrio. Vi ankoraŭ plukreskas. Sed kiam vi vivos ĉiujn homajn vivojn en ĉiuj tempoj, vi estos kreskiĝinta sufiĉe por naskiĝi.”

“Do, la tuta universo,” vi diris, “ĉi tie, estas nur...”

“Ovo”, mi respondis. “Kaj nun estas tempo, por ke vi daŭru en via venonta vivo.”

Kaj mi sendis vin al la vojo vi devis iri.

verkis **Andy Weir**

tradukis kaj sendis **Coşkun Atak** el Turkujo

## Arto en la Traduko

**La angla originalo unue aperis en la aŭtuna 2010 numero de “Source” – reta bulteno de Literatura Fako de ATA (Amerika Tradukista Asocio) kja poste estis surpaperigita por la januara numero 2011 de ‘The ATA Chronicle’. La publikado de la traduko estas permesita.**

**“En piedpilkado bone ludi ne sufiĉas: oni devas senti la ludon profunde”.**

**Jules Rimet**

**E**n Madrido somere estis varmege. En mia loĝejo estis sufoka aero pro la fermitaj fenestroj, kaj la malfermo de ili ne multe helpis. La ĉiujara forveturo de patrinoj kun infanoj atingis sian apogeon, kaj la urbo sentis sin komforte malplena pro la foresto de tiuj, kiuj retiriĝis de la varmego por pasigi kiom eble plej longan tempon en la montaro aŭ ĉe la marbordo. Por mi tio estis la plej ŝatata tempo de la jaro.

Estis jam post la noktomezo, kaj mi sidis meze de la lummakulo en la malluma gastejo en la tria etaĝo. La fenestro antaŭ mi estis malfermita, enkadrigante mian vidon de la nokta ĉielo, pendanta super la kvietaj kvartalo. La varma aero pigre kirliĝis ĉirkaŭ mi kaj mi sidis ĉe mia skribtablo, la fingroj estis sur la klavaro de mia tajpilo – verda porteblo Olivetti,

mia fiero kaj ĝojo.

Estis kutima afero. Oni telefonis al mi posttagmeze por diri pri mendoj kun strikta limdato, kaj ke oni bone komprenas, ke la tarifoj inkluzivos krompagon pro la urĝeco, ĉu tio min interesas? Konsuela enlitiĝis post la vespermanĝo kaj mi restis kun Olivetti kaj la rakonto pri plej intrigaj postkulisaj fiaferoj en la ŝere-komerco en Andaluzio, kiuj plenigis la senordan historion de la suda Hispanio. Bone verkita de vera hispano, kun tre agrabla flueco kaj stilo, ĝi estis gracie bildeca, vera plezuro por legi. Miraklo! Kaj longa – do, mi planis ne dormi la tutan nokton.

Frumatene Konsuela stariĝis malantaŭ mi, tenante siajn manojn sur miaj ŝultroj kaj rigardante la ĉielon. “Vi ĉiam faras tion, ricevante ion similan,” – ŝi diris. Mi kapjesis. “Via traduko fariĝas via querida <sup>1</sup>, – ŝi murmuris, deturnante sin, – via amatino.” Ŝi pravis. La similan tradukon oni devas trakti atente. Ĝi enhavas tiom da nuancoj kaj subtilaĵoj, ke oni devas senbarakte permesi la entiriĝon. Tio postulas cedi pormomente la tutan vivon kaj, siavice, stimulas pinglopintan fokusiĝon, kiu estos riĉe rekompencita.

Vicoj de miaj pensoj estis interrompitaj, kaj mi rektiĝis streĉante min en la seĝo. Mia kolo estis rigidiĝinta, ankaŭ la ŝultroj. Mi ekstaris, proksimiĝis al la fenestro kaj rigardis malsupren. Viro promenis laŭ la



trouaro de la kontraŭa stratflanko, lia ombra silueto longiĝis en la lumo de la stratlanternoj. Unu mano en la poŝo, la alia svingiĝis flanke. Atinginte la angulon, li malaperis. Nun la strato estis senhoma kaj kvietaj, kaj strange bonvena. Mi lasis letereton sur la tajpilo kaj iris malsupren. La kafejo "Gijón" estis proksime, kaj estos agrable promeni tien. "Gijón", ŝajne, neniam estis fermata, kaj kelkaj gastoj jam sidis tie, kiam mi venis. Mi mendis viskion kun sodakvo en alta glaso. Les mano falis sur mian ŝultron, kaj mi turnis min: "Hombre, Javier! <sup>2</sup>" Ksavero estas verkisto, kiu pro diversaj cirkonstancoj laboras ankaŭ kiel tradukisto. Li komprenas noktulojn laŭ la propra sperto kaj pro tio demandis: "Kiel vi fartas?" "Ĉio bonordas, – mi diris al li. – La rakontado estas bona, estas neniuj problemoj kun terminaro, sed mi penas transdoni la tonon de la originalo, vi ja scias, la etoson, la deĵo <sup>3</sup>, la esencon de Andaluzio, kio estas tiom grava parto de la novelo. Ĝis nun mi ne kaptis tion."

Ksavero larĝe ridetis kaj mendis ankoraŭ po glaso. "Etoso? Deĵo? Esenco? Kiaj vortoj!! Kion vi intencas fari – krei artaĵon?" Mi pensis momenton, kirlante perfingre la glacikubetojn en mia glaso, kaj diris: "Jes, fakte tion mi volas fari." Ksavero pristudis mian vizaĝon, liaj brovoj leviĝis. "Vi komprenas tion ĉi, – mi daŭrigis. – Ni tradukas diversspecajn dokumentojn; iuj estas teruraj kaj aliaj estas pli-malpli interesaj, kelkaj estas bone verkitaj, sed tre malofte ni trovas ion nepre tradukindan. Tio ĉi estas unu el tiaj. Mi volus fari tion, kion faris la verkisto hispane. Mi volas, ke la angla versio posedu la saman duende <sup>4</sup>, la saman magian kvaliton, kiel la originalo."

Ksavero kapjesis kaj ekridetis: "Mi rekonas tiujn ĉi simptomojn! Ankaŭ mi suferis tion, samkiel vi ĉi-vespere. Laŭ mi, amiko mia, transfuzon de flamenko – jen kion vi bezonas ĉi-momente. Ni iru al "Las Brujas" <sup>5</sup>, mi regas."

Ekzistas nenio pli animplena, ol la voĉo de la flamenkokantistino, precipe kiam ĝi interplektiĝas en la serenado kun la muziko de la flamenka gitaro kaj senvuala pasio de la flamenkodancisto. En la malhela, fuma lumo en "Las Brujas" ni eksentis la pulsadon de klakantaj manoj kaj la frapadon de kalkanumoj, kaj ni ekspiris pli profunde. "Vi deziras priskribi la odoron kaj la esencon de Andaluzio? – kriegis Ksavero. – Tio ĉi estas vera Andaluzio." Li pravis. Flamenko venis de Nord-Afriko kun la maŭroj kaj la suda Hispanio heredis la muzikon de la dezerto. Ekde tiam la grandaj urboj Granada, Sevilo kaj Kordobo produktis generacion post generacio flamenkoartistojn, kiuj konservis la tradiciojn de siaj prapatroj, de tiuj, kiuj ekloĝis en Andaluso. "Tion, kion vi povas aŭdi en flamenka

taverno, kiel tiu ĉi, ankoraŭ ne estas la tuto, – aldonis Ksavero. – Iam sidiĝu kviete, dezirinde kun la okuloj fermitaj, kaj aŭskultu – atente aŭskultu! – Recuerdos de la Alhambra de Tárrega <sup>6</sup>. Vi enprofundiĝos en la esencon de la sudo."

La strato estis senhoma, kiam ni eliris el la drinkejo. Ni piediris tra la Calle Mayor al la Paseo kaj baldaŭ ekvidis la Muzeon Prado, blanke lumanta apud la Parque Retiro. "Ĉu vi deziras meti iom da arto en vian tradukon? – demandis Ksavero, montrante per la cigaro. – Estas multe da arto tie!"

"Estas domaĝe, ke ĝi estas fermita," – mi diris.

"Por favor! <sup>7</sup> – kraĉetis Ksavero, frapante la frunton per la libera mano. – Kiel vi intencas enmeti arton en vian tradukon kun la simila sinteno? Iru kun mi!" Li prenis min ĉe la brako kaj kondukis min trans la straton, poste li malrapide promenigis min tien kaj reen laŭ la apudmuzea trotuaro, parolante serioze kaj insiste: "Se vi volas, ke via traduko estu arta kreaĵo, la arto devas esti ene de vi. Ĉio vidata kaj komprenata de vi inspiru vian vortelekon. Pensu pri la pentraĵoj kaj la skulptaĵoj, viditaj tie ĉi. Memoru pri Goya, Velásques, la malnovaj majstroj, ĉu vi povas imagi ilin en via menso? Rigardu ilin pli atente. Ili ja alparolas vin, ili volas ion diri al vi. Aŭskultu!"

Mi faris tion, kaj mia menso estis plenigita per pensoj pri formo kaj koloro, proporcio kaj perspektivo. La fingroj sur la manoj de la statuo komencis moviĝi kaj la siluetoj de ĝia ŝtona korpo memorigis al mi jam konatan belecon. Resono de la historio eniris mian memoron, kaj la pasinteco klariĝis. Ĉio havis ritmon kaj kialon, kaj mi eksentis, kion oni penis diri. Subite mi ekvolis reveni al mia traduko. Mi diris tion al Ksavero kaj li ekridis: "Ĉu vi aŭdis la urĝan vokon de la amatino, kiun vi ne povas ignori? Do, tempo venis. Ni iru hejmen!"

Ni devis trapasi nur kelkajn kvartalojn, kaj promenado estis agrabla: unu mano en la poŝo, la alia svingiĝis flanke. La senhomeco de la stratoj kreis senton de la spaco, proponanta senfinajn eblecojn. La graciaj linioj de la trafikcirklo aludis al pli frua epoko, kiam estis tempo por halti kaj ĝui specifajn momentojn, vivi pli malrapide kaj en harmonio kun ĉirkaŭo. Estis idiliaj tempoj, venis al mi en la kapon, kiam ŝereo estis personigo de la vivmaniero.

Denove hejmo, la lampo ankoraŭ lumigas la tajpilon. Mia letereto restis nelegita. Mi fermis la kuirejan pordon kaj preparis iom da kafo. Poste mi staris ĉe la fenestro kaj rigardis la unuan lumstrion, aperanta sur la horizonto. Mia menso estis klara kaj mi sentis min ekscitiĝinta. Mi sidiĝis kaj eklaboris.

Fonto: **Ukraina Stelo**, #1-2, 2017

<sup>1</sup> amatino (hispane)

<sup>2</sup> Ksavero, amiko (hispane)

<sup>3</sup> tie ĉi – odoro, gusto (hispane)

<sup>4</sup> elfo (hispane)

<sup>5</sup> La sorĉistinoj (hispane)

<sup>6</sup> Francisko Tárrega (1852-1909) – hispana gitaristo, komponisto, muzikinstruisto

## Vasil Kadifeli – Tradukisto-Esperantisto verkis kaj sendis Elena Popova, el Bulgario

(publikigita kun dankemo al Elena Popova el Bulgario)

### VASIL KADIFELI – TRADUKISTO-ESPERANTISTO -- al Vasil Kadifeli dum lia jubilea naskiĝdatreveno --

**M**i konatiĝis kun Vasil Kadifeli el Turkio dank al E- sumoo, kie li estas aktiva prizorganto kaj kelkfoje mi estis en lia grupo.

Kiu estas li? – malfacila respondo pri homo, kiun mi konas nur de nia korespondado, sed mi provos respondi. Li naskiĝis en Istanbulo en la jaro 1959, finis komercan administradon, kaj maagistris en komputila scienco, laboris en dicensaj bankoj kiel komputila programisto. Li scipovas krom turka ankaŭ grekan kaj



anglan lingvojn. Esperanton li komencis lerni en la jaro 2012 kaj nun li gvidas E- kursojn, estas membro de UEA, verkas kaj tradukas. Multe da homoj konas

lian nomon, kiel eldonisto de la treege interesa E- revuo "Turka Stelo"- 32 p, kiun li tre modeste nomas revueton. Ĉirkaŭ 350 abonantoj el la tuta mondo legas ĝin ĉiu monate. La revuo estas senpaga kaj libere abonebla.

Jen nur kelke da opinioj de la legantoj pri la revuo:

*"Estimata, Denove mi ricevis vian bonegan "revuegon"! Kaj denove mi gratulas , ke ĝi plu alportas riĉenhavan, variajn, valorajn legaĵojn. Aparte plaĉas al mi la varieco de temoj: filozofio, historio, mitologio, literaturo, poezio, movadaj diskutoj... Vere leginda, por ĉiuj gustoj!*

*Dankegon!"*

*- Paulo Sergio Viana, Brazilio, vicprezidento de BEL*



*"Karaj sumoo-istoj, aperis Turka Stelo kompilita de unu el la prizorgantoj. La revuo estas nekredible bela kaj enhavoriĉa, do ĝi certe plaĉos al vi, libroamantoj..."*

*- Hori Jasuo, eldonisto el Japanio kaj kreinto de E-sumoo.*

*"Kara samideano! Mi legas kun tre granda intereso vian revuon kaj mi opinias, ke ĝi estas unu el la plej kvalitaj kaj plej utilaj en la nuntempa Esperatujo. "*

*- Venelin Mitev el Bulgario*

Li estas treege laborema kaj respondeca. Li estas tradukisto de la "Poezia Antologio Nazim Hikmet Ran"- 203 p, 2016 , eldonita de Mondial, Novjorko. La libro estas en du lingvoj - turka kaj Esperanto.

Li estis konsilanto por kelke da miaj libroj, pri kio mi elkore dankas al li.

La jaroj 2018 kaj 2019 estss sukcesaj por li. Li ricevis la jenajn premiojn:

- Du duajn premiojn (tradukaĵoj en prozo kaj poezio) en la 2-a Internacia Tradukkonkurso "Lucija Borĉić" organizita de la Kroata Esperantista Unuiĝo, 2018.

- Unua premio en la Internacia Literatura Konkurso "Hristo Gorov", Sofio, Bulgario, por originale verkita rakonto, 2018.

- Tria premio en la Internacia Literatura Konkurso "Abritus", Razgrad, Bulgario, en la branĉo humuro, 2019.

- Diplomo pri Elstara Agado, premio de UEA dum la 10-a UK en Lahtio, Finnlando, 2019.

Mi fieras, ke ni iĝis gekorespondantoj kaj geamikoj. Mi deziras al li sanon kaj prosperon en liaj bonaj agoj!

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario

## La brazila astronauto kaj Dio

**L**a unua brazila astronauto veturis al la spaco, restis en orbito ĉirkaŭ la Tero dum kelke da tagoj kaj poste revenis en la planedon.

Televido, radio, gazetaro, revuoj: ĉiuj amaskomunikiloj - ne nur en Brazilo - volis intervjui lin kaj demandi pri la spaco... kaj ĉu li vidis Dion tie.

Li estis plurfoje intervjuata, sed al neniu li diris "jes" aŭ "ne" por la demando: "Ĉu vi renkontis Dion en la spaco?"

Ankaŭ la tutmondaj gravuloj deziris inviti la brazilan astronauton viziti iliajn sidejojn por konversacii kaj demandi ĉu li vidis Dion en la spaco.

La unua potenculo kiu ricevis la astronauton estis la romkatolika papo. Post ol montri la tutan Vatikanon, Lia Papa Moŝto ricevis lin en la Siksta Kapelo. Post da dua glaso da vino, li demandis kun serioza voĉo:

- Ĉu vi renkontis Dion en la spaco, mia filo?

- Ne, Papa Moŝto, mi ne vidis Dion tie. Certe Dio ne ekzistas. Mi asertas tion.

- Ho mia Dio! Terure! Kia fuŝa damaĝo! Sed neniu povas koni tiun informon. Mi donos al vi unu milionon da dolaroj, por ke vi ne rakontu tion al alia ajn homo.

La astronauto akceptis la proponon de la papo, prenis la monon kaj foriris.

Poste la reganto de Sovetunio invitis la kosmonaŭton (tiel la rusoj preferas nomi la spacvojaĝantojn) viziti Moskvon.

## -- tradukis Júlio César Pedrosa el Brazilo

En la Kremlo, post la dua glaso da vodko, la soveta ĉefulo diris:

- Kamarado, vi certe ne vidis Dion en la spaco, ĉu ne? Dio ne ekzistas! Niaj sciencistoj pruvis tion.

- Kamarada Moŝto, Dio ja ekzistas! Mi vidis Lin tie!

- Je la mumio de Lenino! Kia fuŝa damaĝo! Sed neniu povas koni tiun informon. Mi donos al vi dek milionojn da dolaroj, por ke vi ne rakontu tion al alia ajn homo.

La astronauto akceptis la proponon de la soveta ĉefulo, prenis la monon kaj foriris.

El Sovetunio la astronauto venis en Usonon. La usona prezidanto jam atendis lin en Vaŝingtono por konversacii pri gravaj aferoj.

En la Elipsa Ĉambro de la Blanka Domo, post la dua glaso da viskio, la usona prezidanto demandis:

- Diru, mia kuraĝa astronauto, ĉu vi vidis Dion en la spaco?

- Jes, Sinjoro Prezidanto, mi vidis Dion tie, kaj...

- Ho glora Georgo Vaŝingtono! Li ja ekzistas!

- ... kaj Ŝi estas nigra!

*(El la portugala lingvo tradukis kaj adaptis: Júlio César Pedrosa. Aŭtoro nekonata.)*



## Kiel oni difinas sciencfikcion?

## -- el blogo "Pri io ajn"



**L**a difino de sciencfikcio estas malsimpla. Ŝajne ĉiu havas sian propran difinon.

Laŭ la Reta Vortaro, sciencfikcio estas "rakonta ĝenro, kiu prezentas imagaĵojn pri estontaj


sekvoj de scienco kaj teĥniko, pri aliaj planedoj ol la Tero kaj pri aliaj similaj temoj."

Tio havas sencon, sed ĝi ne montras la koron de sciencfikcio laŭ mi.

Ekzemple, oni ofte nomas

Frankenŝtejnon la unua sciencfikcia romano. Ĉu ĝi estas sciencfikcio laŭ tiu difino? La libro donas neniajn detalojn pri ia scienco aŭ teĥniko. Sen kunteksto pri la scienco de 1818, la rakonto ŝajnas tute fantasta laŭ la sama vortaro.

La klarigo de Vikipedio inkluzivas la socian kuntekston. Laŭ Vikipedio, ĝi estas "literaturo aŭ kinarto pri okazaĵoj en iugrade probable mondo, plej



>>>



ofte estonteco aŭ malproksima pasinteco, sed foje ankaŭ en la nuno (aŭ en paralela mondo aŭ eĉ en ĉi tiu). Ofte ĝi prilozofiumas aŭ kritikas hodiaŭan socion. (Male al fantasto, kiu ne postulas tian logikon, sciencfikcio estu bazita sur faktoj – ofte almenaŭ sur fikcioj kiuj aspektas kiel faktoj.)”

Tio estas pli bona ol la difino de la Reta Vortaro sed ĝi limigas la gravecon de kritikoj al nuna socio kaj ĝi estas iomete neklara.

>>>

Laŭ ĝi, sciencfikcio temas pri estontecaj, pasintecaj, aŭ eĉ nunaj okazaĵoj. Kiam alie povus okazaĵo okazi? Ĝi estas bazita sur faktoj aŭ sur fikcioj aspektantaj kiel faktoj. Do, io ŝajne eblas. Tiu vorto “prilozofiumas” ne aperas alie sur la reto, aparte de citaĵoj de tiu frazo el Vikipedio mem (kaj nun tiu ĉi frazo pri ĝi). Mi pensas ke mi komprenas la ideon de tiu vorto, sed mi ne certas kiel ĝi estas malsama ol “filozofias.”

Kaj ankaŭ tio ne jam atingas la koron de la ĝenro. Tiu longa klarigo de Vikipedio neniam mencias teknologion. Kiam oni pensas pri sciencfikcio, oni pensas pri teknologio, pri kosmoŝipoj kaj tempoveturiloj. Kaj la socia kaj la teknologia partoj estas ligitaj en la ĝenro. Ekzemple, la televido Star Trek ne estus la ofta ekzemplo pri sciencfikcio sen kaj kritikoj pri socio kaj estontecaj teknologioj. Bona difino devas enhavi ambaŭ.

Isaac Asimov, eble la plej bona verkisto de la ĝenro, havis tian difinon. Li donis sian propran difinon

de sciencfikcio en 1975. Li skribis “sciencfikcio povas esti difinita kiel tiu fako de literaturo kiu traktas la reagon de homoj al ŝanĝoj de scienco kaj teknologio.”

Tio estas bela difino. Ĝi inkluzivas la plej gravajn partojn de la ĝenro kaj estas sufiĉe simpla kaj klara.

Ĉe gimnazio, mi prenis kurson pri sciencfikcia literaturo. Ankaŭ mia instruisto ŝatis la difinon de Asimov. Li iomete vastigis ĝin, “la ĝenro de sciencfikcio traktas la reagon de homaro al novaj ideoj kaj teknologioj.” La difino tiel inkluzivas ne-sciencajn ŝanĝojn, ekzemple reagoj al filozofiaj ideoj. La okazo en la libro 1984 ne vere temas pri ŝanĝoj de scienco aŭ teknologio, sed ŝanĝoj en la filozofio de la registaro.

Sed nun ni atingas la limojn de sciencfikcion. Ne ĉiu inkluzivas tiajn librojn en la ĝenro. Eble la difino de Asimov estas pli bona. Laŭ mi, ambaŭ taŭgas ĉar mi vidas novajn ideojn kiel lingvon kiel formon de teknologio, sed mi komprenas se aliuloj ne volas inkluzivi librojn kiel 1984-on en la ĝenro.

En la historio de literaturo, sciencfikcio estas tre nova ĝenro. Ĝi havas nur 200 jarojn. Tamen ĝi estas unu el miaj plej ŝatataj ĝenroj kaj laŭ mi ĝi estas grava parto de la literaturo. Kio estas kaj ne estas parto de la ĝenro estas diskutibla. Sed ankaŭ diskutinda.

verkis **Jason Mey** el Usono


Fonto: el la blogo Pri la Aĵn - Blogo de variaj temoj <https://priioajn.wordpress.com/2019/04/04/kiel-oni-difinas-sciencfikcion/>

## Porko sub kverko

## fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

La Porko sub la Kverk-kolos'  
Per glanoj en abund' regalon bonan havis,  
Kaj poste sub la kverk' ekdormis por ripoz'.  
Post dormo kaj vekig' la Porko tute bravus  
Kaj grundon ĉe radik' per la muzelo kavis.  
"Por arb' ĝi estas malutil'",  
La korvo diras laŭ konsil':  
"Se nudos la radik', sekiĝo sekvos plena".  
"Sekiĝu ĝi", ekgruntas Pork' sur ter';  
"Por mi la kverka sort' ne estas ja ĉagrena.  
Ĉu vivos kverk' aŭ ne, ne gravas la afer',  
Al mia bona staŭ' ne povas ĝi utili.  
Ekzistu glanoj nur, grasiĝas mi per ili".  
Al Pork' respondas Kverk': "Sendanka estas vi!  
Se povos vi muzelon supren teni,  
Kapablus vi kompreni,  
Ke kreskas ĉiu glan' sur mi".  
Per sia blind' similas sensciulo:  
Por li scienco estas nulo,  
Ignoras li pri studo kaj esplor'  
Sed manĝas fruktojn de scienc-labor'!

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio  
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)  
Ukrainio



**L**a reĝo posedis tre belan katon. Trang Quynh havis la ideon forrabi ĝin de li. Li tuj efektivigis sian planon, kaj baldaŭ la kato venis loĝi ĉe Trang Quynh, kiu fariĝis laŭlega posedanto de la besto.

Por sukcese pravigi sin en ĉiam antaŭvidebla disputo, la ruzega Trang Quynh komencis speciale dresi la kvarpiedulon. Ĉiutage, li metis tiun lastan inter du pladoj, el kiuj unu estis plenigita per plej bonaj manĝaĵoj kaj la alia, per malpuraj manĝorestaĵoj.

La besto, bone nutrita ĉe la reĝo, tuj kompreneble, sin ĵetis sur la pladon, kiun ĝi trovis plej konvena por sia gusto. Sed, tio, kion ĝi tute ne atendis estis forta vergobato, kiun la nova mastro donis al ĝi sur la dorson, samtempe kiam brutala mano revenigis ĝin per la orelo al la malŝatita plado.

Tiu maneĝo ripetiĝis ĉiutage kaj, kiel ĉia brogita kato timas malvarman akvon, tiu de Trang Quynh, post kelka tempo, fine rezignis komplete siajn aristokratajn kutimojn.

Estis la momento, kiun atendis Trang Quynh por montri sian katon tute malkaŝe.

La reĝo baldaŭ eksciis, en kiuj manoj troviĝis lia malaperinta havaĵo. Li perforte venigis Trang Quynh kaj la katon. Nenia dubo: la besto, kiun li vidis antaŭ si estis ĝuste lia.

Trang Quynh estis do konvinke kulpigita pri ŝtelo malprofite por la reĝo. Facile estas diveni, kio okazos

al li.

- Eblas, ke mia kato similas al tiu de Via Reĝa Moŝto, sed ĝi vere apartenas al mi, - protestis Trang Quynh. la simileco de la felkoloro estas tute malfirma pruvo! Estas centoj da katoj, kiuj similas unuj al la aliaj. Por definitive konkludi, al kiu apartenas la kato, necesaj estus pli konvinkaj pruvoj.

- Kaj kian pruvon vi povos doni por nin konvinki, ke tiu kato apartenas al vi, senhonta fripono?

- Jen ĝi estas! Via Reĝa Moŝto havas favorajn kondiĉojn por bone nutri sian katon, kiu devas esti tre delikata en sia manĝo. La mia, kiu devas adapti sian vivmanieron al tiu de sia mastro, povra sentaŭgulo, malfacile gajnanta sian vivopanon, evidente havas pli plebajn gustojn. Vi ordonu, ke oni alportu du pladojn diferencajn per la kvalito de ties enhavo, kaj Via Reĝa Moŝto tuj konvinkiĝos pri tio.

La reĝo konsentis kaj la ekzameno okazis.

Senutile estas diru, ke la besto trapasis la elprovon je la gloro de sia nova mastro.

Trang Quynh revenigis sian katon, lasante la reĝon tute konfuzita.

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/la-kato-de-la-regxo/>

### Vortareto

- \* **aristokrato** - homo, kiu apartenas al la nobelaro aŭ al la privilegiita(j) klaso(j).
- \* **diveni** - malkovri per intuicio aŭ rezonado ion, kion oni ne scias.
- \* **dresi** - instrui beston por iu celo.
- \* **felo** - kruda besta haŭto kun la haroj, ordinare ne preparita.
- \* **forrabi** - forporti, kiel forrabaĵon.
- \* **fripono** - tiu, kiu lerte trompas, ruze ŝtelas.

- \* **maneĝo** - ekzerco, per kiu oni dresas ĉevalon.
- \* **plado** - malprofunda, granda speco de telero, sur kiu oni aranĝas kaj disportas manĝaĵojn disdonotajn al ĉiu kunmanĝanto.
- \* **plebo** - en Romo, la plej grandnombra kaj malalta klaso, kontraste kun la kavaliroj kaj la patricioj.
- \* **povra** - kompatinda.
- \* **rabi** - per forto aŭ per minaco forpreni al si ies posedaĵon.
- \* **sentaŭgulo** - iu, kiu havas nenian valoron.

Ero el la libro „Verda koro“

Julio Baghy

Postparolo de la verkinto

Post la tralego de la romaneto certe troviĝas inter la legantoj, kiuj havas impreson: la historio ne estas tute fantazia. Ili pravas. Mi superpaperigis memoraĵojn, kiuj restis vivaj en mia animo. La verkista fantazio malmulte laboris.

Vere, la romanfiguroj ekzistis kaj multaj el ili ankoraŭ vivas. Kelkaj plenumas la solenan promeson, faritan en la „Esperanta Kafejo“, kelkaj aktive ne povas partopreni en la kultura batalo pro diversaj kaŭzoj, sed ĉiuj restis fidelaj al la „ideo“. Mi konservis multajn verajn nomojn. Nur ĉe tiuj fuguroj mi uzis pseudonimojn, ĉe kiuj la konsideroj pri cirkostancoj konsilis tion al mi aŭ pri kies fremdlingva nomo mi ne povis bone rememori.

Preskaŭ du jardekoj pasis. Kuratov kaj la bona Bogatireva forlasis nian mondon, ankaŭ pro kapitano Oba la japanaj samideanoj jam havis funebbron. Marja Bulski eble nun vivas en Mukden kaj laboras por siaj orfaj gefratoj. Pavel Budinka vigle laboras, Janis Lekko, se miaj informoj ne mensogas, estas profesoro en iu alta lernejo en Ruslando. Vonago revenis al sia patronlando: al Polujo. Mihalik estas landa prezidanto de la Hungara Esperanta Federacio. Ŝaroŝi komponis ankoraŭ multe da melodioj, Zinner loĝas en Vieno... kaj por Sunfloro vi forviŝu la bedaŭron! Ŝi vivas kun sia Koluŝ kaj ŝi estas mildkora patrineto de tri tre ĉarmaj ekzotike belaj infanoj. Mi renkontis ilin en... Ne, tio estas ilia sekreto. Koluŝ estis pli kuraĝa ol Nadai, kiu same vivas ie, iel.

Kaj nun ankoraŭ kelkajn vortojn pri tiu ĉi modesta libreto mem. Mi konfesas, ke mi verkis ĝin nur por plenumi deziron ofte ripetatan kaj direktatan al mi. Literaturajn pretendojn mi ne havas por ĝi. Tamen mi havas peton al la kritiko la unuan fojon mia vivo: konsideru la malfacilaĝojn, kiujn verkisto havas, kiam li devas lukti konstante pro manko de la vortoj kaj ĉiumomente pripensi, ke tiun aŭ alian gramatikan regulon la leganto ankoraŭ ne lernis.

Mi deziras doni ne „majstran verkon“, sed simplan legolibron kun grandigita stilo al niaj novaj samideanoj, pri kies lingva nivelo ni, verkistoj, ĉiam forgesas en la momento de la inspiro kaj lingvokreado. Mi deziras enmanigi tian verketon al la novaj adeptoj, kiu libro entenu iom el tiu neestingebla fajro, kiu donas koran varmon al mi kaj al la multaj

dekmiloj en la mondo, kie hodiaŭ regas ĥaoso kaj en kiu la minaca ombro de nova milito, pli terura kaj pli eksterma ol antaŭa, malheligas la revoteksan optimismon de la homoj. Mi volis prezenti simplavorte al ili konsolan realecon de la pasinto... kaj fine mi volis prepari la duan ŝtupon por tiuj, kiuj iam lernis en la Ĉe-metodaj kursoj legante „Nik Nek kaj Kat Jen“, mian porkursan gajan rakonteton el la „Konversacia Literaturo“. Ĉu la dua ŝtupo plaĉos al ili, mi ne scias, sed mi klopodis fari ĝin taŭga, fortika por doni al ili faciligan eblecon progresi plu en la lingva evoluo.



Mi deziras al vi, kiuj honoris tiun ĉi verketon per atenta tralego, ke la varmo de la verdstela koro de Iĉio Pang veku en vi komprenon kaj kuraĝan laboremon pri kaj por tiuj faktoj, kiuj hodiaŭ montras la vivantecon de nia lingvo. Konsideru vi, novaj gesamideanoj, ke hodiaŭ nia lingvo havas organizitajn neŭtralan kaj laboristan movadojn, viglaj naciaj societoj klopodas utiligi la lingvon en ĉiu medio de la homa socio, ni havas centran organizon, internacian instituton por la instruado, konstante riĉigantan literaturon, fakajn organizaĵojn kaj el tio ĉerpu la fortan kredon, ke Esperanto estas neelŝirebla plu el la vivo, ĉar la Vivo mem postulas por si la latinon de la modernaj tempoj: nian belan lingvon.

La libron el Esperanto en ĉeĥan tradukis **J.Drahotová**

*Solvo de la  
krucvort-enigmo*



	A	V	I	A	N
O	S	O	B	M	A
T	A		O	I	T
E	L	O		T	T
E	L	E	Ĝ	N	A
R	E	T	N	I	